





Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015-MADRID  
Tel: +34 - (9)1 - 4468079

# CLAVE

DE LOS TEMAS Y EJERCICIOS CONTENIDOS

EN EL

CURSO PRÁCTICO DE ESPERANTO



16x1970 h/2003090

# CLAVE

DE LOS TEMAS Y EJERCICIOS CONTENIDOS

EN EL

CURSO PRÁCTICO DE ESPERANTO

POR

**R. Duyos Sedó**

CAPITÁN DE INFANTERÍA

**V. Inglada Ors**

CAPITÁN DE ESTADO MAYOR

Profesores aprobados

por la Socleto Franca p. p. Esperanto



BARCELONA

José Espasa, Editor

759, CALLE DE LAS CORTES, 579

—  
Es propiedad



Tipografía de José Espasa, calle de las Cortes, 579. — Barcelona

## FE DE ERRATAS

PÁGINA	LÍNEA	DICE	LÉASE
6	6	ĝarentajn	argentajn
10	28	gatetoj	katetoj
11	11	Cu	Ĉu
12	13	Cu	Ĉu
14	5	hadiaŭ	hodiaŭ
14	28	artejn	artajn
18	10	ŝian	ŝia
18	13	recivis	ricevis
19	19	anstata traktiŭ	anstataŭ trakti
19	21	divis	vidis
21	36	lim	lin
24	1	kium	kiun
25	33	ŝa	aŭ
68	8	<i>serin</i>	<i>virita</i>
55	27	<i>antakdis</i>	<i>kantadis</i>
53	10	<i>marŝon</i>	<i>marŝon</i>
39	32	<i>kieraŭ</i>	<i>kieraŭ</i>
51	28	<u><i>qvara</i></u>	<i>tria</i>
51	18	<i>min</i>	<i>nin</i>
28	18	<i>mi</i>	<i>oni</i>

# CLAVE DE LOS TEMAS

---

## LECCION 1.<sup>a</sup>

*Tema 1.* Ĉu la tablo estas ronda? — Jes, sinjoro, la tablo estas ronda. — La infano estas bela kaj la patro estas bona kaj afabla. — Ĉu la pano estas mola? — La pano estas mola kaj la papero estas blanka. — Ĉu la ĉapelo estas nigra? — La ĉapelo estas nigra kaj granda. — Ĉu la patro estas ĝentila? — La patro estas ĝentila. — La bona vino kaj la bona kafo. — La mola sapo. — La longa vesto. — Ĉu la salo estas bona? — Jes, sinjoro, la salo estas bona. — Ĉu la infano estas alta? — La infano estas alta kaj bela. — Ĉu la kafo estas bona? — Jes, sinjoro, la kafo estas bona.

## LECCION 2.<sup>a</sup>

*Tema 2.* Ĉu vi havas la belan ĉapelon? — Mi ne havas la belan ĉapelon. — Ĉu vi havas la blankan paperon? — Mi havas la blankan paperon kaj la malgrandan tablon. — Ĉu vi havas la malbelan veston? — Ne, sinjoro, mi ne havas la malbelan veston. — Ĉu la reĝa palaco estas alta? — La reĝa palaco estas alta kaj bela. — Ĉu la reĝo estas bona? — La reĝo estas bona. — Ĉu la patro estas en la ĝardeno? — La patro kaj la filo estas en la ĝardeno. — Ĉu la sapo estas utila? — Jes, sinjoro, la sapo estas utila. — Ĉu vi havas la malbonan panon? — Mi havas la

bonan panon. — Ĉu vi havas la belan blankan ĉemizon? — Mi havas la belan blankan ĉemizon. — Ĉu vi havas la bonan kafon? — Ne, sinjoro, mi ne havas la bonan kafon. — Mi havas la blankan ĉapelon kaj la veston nigran. — Ĉu la patro estas gaja? — La patro estas gaja. — La reĝa placo estas bela kaj malgranda. — La fabriko estas granda kaj la palaco malgranda. — La strato estas longa. — Ĉu la pano estas malmola? — La pano estas mola. — La infano estas malgaja. — La bona kafeo kaj la malbona vino.

### LECCION 3.<sup>a</sup>

*Tema 3.* Kie estas la blanka papero? — La blanka papero estas sur la tablo. — Ĉu vi havas la malgrandajn librojn? — Mi ne havas la malgrandajn librojn. — Kie estas la kafeo kaj la salo? — La kafeo kaj la salo estas sur la tablo. — Ĉu vi havas la orajn plumojn kaj la arĝentajn krucojn? — Mi ne havas la orajn plumojn, sed mi havas la arĝentajn krucojn. — Kie estas la marmoraj tabloj? — La marmoraj tabloj estas en la ĝardeno. — Ĉu la patroj estas en la reĝa palaco? — La patroj estas en la palaco kaj la infanoj en la reĝa ĝardeno. — La vino estas bona kaj la kafeo estas malbona. — La infanoj estas ĝentilaj kaj la patroj estas afablaj. — La plumoj estas mallongaj kaj la tabloj estas longaj. — Kie estas la boteloj kaj la plumoj? — La boteloj kaj la plumoj estas sur la tablo.

*Tema 4.* Ĉu vi havas la kristalajn botelojn kaj la arĝentajn plumojn? — Ne, sinjoro, mi havas la paperajn ĉapelojn kaj la marmorajn tablojn. — Ĉu la ĉevalo estas utila? — La ĉevalo estas utila. — Ĉu vi havas la malgrandajn tablojn kaj la rondajn ĉapelojn? — Mi havas la rondajn ĉapelojn, sed mi ne havas la malgrandajn tablojn. — La malamikoj estas afablaj. — La floj estas bonaj kaj la patroj estas ĝentilaj. — La papero estas blanka kaj bela. — La akvo estas bona, sed la kafeo kaj la vino estas malbonaj. — Ĉu la infanoj estas gajaj? — La infanoj estas gajaj kaj la patroj estas malgajaj.

### LECCION 4.<sup>a</sup>

*Tema 5.* Kiu estas en la domo? — La onklo kaj la patrino estas en la domo. — Kiu estas en la domo de la botisto? — La patroj estas en la domo de la botisto. — La domo de la patroj estas malbela. — Ĉu la najbarino estas bela? — La najbarino estas bela, sed la najbaro estas malafabla. — Kiu havas la vestojn de la reĝino? — Mi ne havas la vestojn de la reĝino, sed mi havas la ĉapelon de la patrino. — Kiu kantas en la ĝardeno? — La bonaj infanoj kantas en la ĝardeno. — Kiu ludas en la placo? — La amikoj de la infanoj ludas en la placo. — Ĉu vi amas la bonajn infanojn de la najbaro? — Mi amas la bonajn infanojn de la najbaro, sed mi malamas la malbonajn. — Ĉu la domo estas pura? — Ne, sinjoro, la domo estas malpura. — Kie estas la kristalaj boteloj? — La kristalaj boteloj estas sur la tablo.

*Tema 6.* Ĉu vi havas la ĉevalojn de la princino? — Mi ne havas la ĉevalojn de la princino, sed mi havas la orajn krucojn kaj la ĉemizojn de la princo. — Kie ni estas? — Ni estas en la ĝardeno de la reĝo. — Kie estas la fabriko de la onkloj? — La fabriko de la onkloj estas en la placo. — Kiuj amas la infanojn? — La patrinoj amas la bonajn infanojn. — Kie estas la belaj libroj? — La belaj libroj estas sur la marmoraj tabloj. — La blanka papero estas sur la alta tablo, kaj la pano malmola estas sur la tablo malalta. — La ora plumo de la amikoj de la onklo estas bona sed malgranda. — La bona vino estas en la kristala botelo. — Ĉu la reĝino estas en la reĝa palaco? — Ne, sinjoro, la reĝino estas en la malgranda ĝardeno. — Ĉu vi havas la plumban krucon de la bona filo? — Ne, sinjoro, sed mi havas la longan veston de la filino.

### LECCION 5.<sup>a</sup>

*Tema 7.* Ĉu hodiaŭ estas mardo aŭ merkredo? — Hodiaŭ estas dimanĉo. — Ĉu vi konas la patrinon de la panistinoj kaj la fratinojn de la pianisto? — Mi ne konas la fratinojn de la pia-



nisto, sed mi vidas la patrinon de la panistinoj. — Ĉu vi vidas la marmorajn tablojn kaj la kristalajn botelojn? — Jes, sinjoro, mi vidas la marmorajn tablojn kaj la kristalajn botelojn. — Kiujn vi konas? — Mi konas la pentriston kaj la pianistinon. — Kiujn vi vidas? — Mi vidas la bonajn infanojn de la najbaro. — Ĉu vi havas du <sup>arg</sup>argentajn krucojn? — Jes, sinjoro, mi havas du ĝardenajn krucojn, tri ĉapelojn, kvar vestojn kaj kvin librojn. — La patro de la princino havas unu fraton kaj ses fratinojn. — Kie ludas hodiaŭ la ĝardenistinoj? — La ĝardenistinoj ludas hodiaŭ en la ĝardeno. — Kiuj kantas en la domo? — En la domo kantas la fratoj de la dentisto. — Ĉu hodiaŭ estas ĵaŭdo? — Jes, sinjoro, hodiaŭ estas ĵaŭdo.

*Tema 8.* Kun kiu parolas la onklino de la najbaro? — La onklino de la najbaro parolas kun la reĝo. — Kiu parolas kun la onklino de la najbaro? — La ĝardenisto parolas kun la onklino de la najbaro, sed ni parolas kun la ĝardenistino. — Kie estas la najbarino? — La najbarino estas en la domo kun la amikoj de la princo. — Kun kiu vi parolas? — Mi parolas kun la onklo de la libristo kaj kun la filinoj de la industriisto. — Kiuj parolas? — Kiuj kantas? — La infanoj kantas kaj la infaninoj parolas. — Kie estas la malgranda libro? — La malgranda libro estas sur la seĝo malalta. — Ĉu vi vidas la malpurajn ĉemizojn de la amiko? — Ne, sinjoro, sed mi vidas du belajn vestojn de la libristino. — Ĉu la placo estas bela? — Jes, la placo estas bela. — Ni parolas kun la amikoj de la onklo kaj vi kuras kun la infaninoj de la najbaro. — Ĉu hodiaŭ estas vendredo aŭ sabato? — Hodiaŭ estas lundo.

## LECCION 6.<sup>a</sup>

*Tema 9.* La monatoj de la jaro estas dudek: Januaro, Februaro, Mardo, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro kaj Decembro. — Kiom da bofratoj vi havas? — Mi havas tri bofratojn kaj unu bofratinon. — Ĉu vi havas la botojn de mia bopatro? — Ne, sinjoro, sed mi havas tiujn de mia parencino. — Kiom da blankaj ĉevaloj havas la fratino

de la pianisto? — La fratino de la pianisto havas ses blankajn ĉevalojn kaj dektri nigrajn. — Kiu havas kvin ĉapelojn? — La bofilo de mia najbaro havas kvin ĉapelojn. — Kiom da jaroj vi havas? — Mi havas sesdek tri jarojn, sep monatojn kaj dekdu tagojn. — Ĉu mi havas la libron de la onklo aŭ tiun de la bofilino? — Vi ne havas tiun de la onklo, sed tiun de la bofilino. — Kie estas la ĉapelo de la patro? — La ĉapelo de la patro estas sur la marmora tablo. — Kiu kuracas? — La infanoj kuracas kaj ludas. — Kie kuracas la infanoj? — La infanoj kuracas en la domo.

*Tema 10.* Kiom da kristalaj boteloj vi havas? — Mi havas mil ducent ok. — Kvindek ok. — Sepcent okdek naŭ. — Mil naŭcent ses. — Tridek kvar mil okcent kvindek du. — Ĉu la infano havas la arĝentan krucon de la princo aŭ tiun de la onklo? — La infano havas la arĝentan krucon de la princo kaj tiun de la onklo. — Ĉu vi havas tiun de la patro aŭ tiun de la bopatro? — Mi ne havas tiun de la patro, sed mi havas tiun de la bopatro. — Mi havas tiun de la frato kaj tiun de la bofratino. — Ĉu hodiaŭ estas ŝaŭdo aŭ vendredo? — Hodiaŭ estas dimanĉo. — Ĉu vi vidas la filojn de la komercisto kaj tiujn de la pianisto? — Jes, sinjoro, mi vidas la filojn de la komercisto, tiujn de la pianisto kaj tiun de la ĝardenisto. — La amikino parolas kun la bopatrino de la frato kaj kun la bofratino. — Kun kiu ni parolas? — Kun la princo. — Kiom da vestoj vi havas? — Mi havas kvin. — Kiom da amikoj kaj kiom da amikinoj havas la panistino? — La panistino havas kvar amikojn kaj dek amikinojn. — Kiom da tabloj kaj seĝoj havas la patro? — La patro havas tri tablojn kaj naŭ seĝojn.

## LECCION 7.<sup>a</sup>

*Tema 11.* Kiom da seĝoj vi havas? — Mi havas tri seĝojn kaj du tablojn. — Kiom da sezonoj havas la jaro? — La jaro havas kvar sezonojn; la somero kaj la printempo estas du belaj sezonoj, sed la vintro kaj la aŭtuno ne estas belaj. — Ĉu vi havas la kvinan libron? — Ne, sinjoro, sed mi havas la dudek-unuan. — Ĉu vi parolas kun li? — Jes, sinjoro, mi parolas kun li kaj kun

lia bopatro. — Ĉu vi konas la duan filon de mia bofratino? — Mi ne konas la duan filon de via bofratino, sed mi konas tiun de via bofrato. — Ĉu la kafo estas varma aŭ malvarma? — La kafo estas malvarma. — Kiom da monatoj havas via infano? — Mia infano havas tri monatojn kaj du semajnojn. — Kie estas viaj amikoj kaj la najbaroj? — Miaj amikoj kaj la najbaroj ludas en la ĝardeno. — Li estas afabla kaj bona. — Liaj vestoj estas longaj, sed belaj. — Kie estas viaj filoj? — Jen estas miaj filoj. — Jen estas mia ĉapelo.

*Tema 12.* Kie estas la boteloj de la onklo? — La boteloj de la onklo estas sur la fera tablo kaj la plumoj de la onklino estas sur la seĝo. — Ĉu vi ludas kun miaj filinoj? — Mi ne ludas kun viaj filinoj, sed kun viaj filoj. — Kie estas mia kuzino? — Via kuzino estas tie. — Ĉu vi havas mian molan sapon? — Ne, sinjoro. Via mola sapo estas tie, sur la tablo. — Ĉu vi havas liajn librojn? — Jes, sinjoro, mi havas liajn librojn kaj la viajn. — Kiuj kantas? — La infanoj de mia boonklo kaj la najbaroj de mia fratino kantas. — Ĉu vi havas viajn plumojn? — Mi havas miajn plumojn. — Ĉu vi havas? — Jes, mi havas. — Ĉu vi vidas miajn blankajn ŝevalojn kaj miajn nigrajn ŝevalinojn? — Tie mi vidas viajn ŝevalojn kaj viajn ŝevalinojn. — Januaro kaj Februaro estas malvarmaj. — Tri kaj sep estas dek. — La oka kaj naŭa libroj estas grandaj. — Ĉu hodiaŭ estas ĵaŭdo aŭ vendredo? — Hodiaŭ estas sabato. — Kiom da kuzoj havas la pianisto? — La pianisto havas du filojn kaj unu filinon, sed li ne havas kuzojn.

## LECCION 8.<sup>a</sup>

*Tema 13.* Kiom da vestetoj havas la filino de via bopatrino? — La filino de mia bopatrino havas dek unu vestetojn. — Kiom da pordetoj havis la domo de via frato? — La domo de mia frato havis du pordetojn kaj kvin fenestretojn. — Kiam vi ludis kun miaj filoj? — Hieraŭ mi ludis kun viaj filoj, sed hodiaŭ mi ludas kun viaj fratinoj. — Kun kiu mi parolis? — Vi parolis kun li kaj kun liaj amikoj. — Kiu parolis kun mi? — La lavistino paro-

lis kun vi. — Kie estas miaj botetoj? — Viaj botetoj estas sur la alta tablo. — Ĉu liaj boteloj estas grandaj aŭ malgrandaj? — Liaj boteloj estas malgrandetaj, sed la boteloj de mia bopatro estas grandetaj kaj belaj. — Kiam li parolis kun mi? — Li parolis kun vi hieraŭ, sed hodiaŭ, li ludis en la ĝardeno kun la infaninetoj de la ĝardenisto kaj kun la nevinetoj de la laboristino. — Kie vi estis hieraŭ? — Hieraŭ mi estis en la reĝa ĝardeno. — Hieraŭ mi aĉetis la feran martelon kaj lavis miajn vestojn kaj miajn kravatojn.

*Tema 14.* Ĉu vi rompis la botelon? — Mi ne rompis la botelon, sed la tablon. — Ĉu la tablo estis ronda aŭ ne? — La tablo estis ronda. — Kiuj estis hieraŭ en la teatro? — En la teatro estis viaj amikoj kaj la kuzoj de lia patro. — Ĉu la komedio estis bela? — La komedio estis agrabla. — Por kiu estas la libreto? — La libreto kaj la kraĵono estas por mia amiko. — Ĉu vi havas teon, kafon, sukeron kaj panon? — Mi havas kafon, teon kaj sukeron, sed mi ne havas panon. — Mia fratino estas bela kaj juna, sed mia patrino estas maljuna. — La juna reĝo parolis kun mi. — Kie estas la bovoj kaj la bovinoj? — La bovoj kaj la bovinoj estas en la ĝardeno de la kastelo, sed la ĉevaloj kaj la ĉevalinoj estas en la ĝardeno de la reĝa palaco. — Ĉu vi vidis la lokon kie estis la fenestro? — Jes; sed mi ne vidis la lokon kie estis la pordeto. — Ĉu vi faris hieraŭ la panon? — Ne, hieraŭ ni ne laboris. — Hieraŭ estis dimanĉo kaj ni ne laboris. — Kiam vi aĉetis la karbon? — Hieraŭ. — Mi aĉetis la kordonon por mia filino kaj la ĉapelon por mia filo.

*Tema 15.* Hieraŭ mi estis en la teatro kaj parolis kun lia patro, sed mi ne vidis liajn fratinojn. — La urbo estas granda kaj bela. — Kiam mi estis en la domo de mia onklo, mi lavis la veston. — Mi havas malpurajn manojn. — Madrido, en la 9.<sup>a</sup> de Decembro de 1905. — Dekkvin kaj dudek faras (aŭ estas) tridek kvin. — Februaro havas dudek ok tagejn. — La tago estas malvarma. — La kvina de Aŭgusto estis ĝa do kaj la dudeka de Junio estis dimanĉo. — Ni legis la tridek librojn kaj en la dudek dua estas la letero de la reĝo. — Ĉu vi faras la teon? — Jes, mi faras la teon por via patro. — Ĉu vi aĉetis la sukeron? — Mi aĉetis

la sukeron, sed ni ne havas vinon. — Hieraŭ ni rompis la oran plumon de nia patro. — Ĉu vi parolis hieraŭ kun la tajloro? — Hieraŭ mi parolis kun la tajloro kaj aĉetis la frakon. — Por kiu estas la frako kaj la bastonoj? — La frako estas por mi kaj la bastonoj estas por mia familio. — Ĉu li amas mian patron kaj mian patrinojn? — Li amas vian patron kaj vian patrinojn.

## LECCION 9.<sup>a</sup>

*Tema 16.* Ĉu vi konas la hispanan lingvon? — Mi ne estas hispano, sed mi konas kaj parolas la lingvon hispanan. — Kiom da lingvoj parolas la baronino? — Ŝi parolas tri lingvojn; la italan, la francan kaj la germanan. — Ĉu vi havas la kudrilon de la kombistino? — Ne, sinjoro, sed mi havas la tranĉilon de la kudristino. — Ĉu mia bopatrino havas la buteron de la germano aŭ la spegulon de la franco? — Via bopatrino ne havas la buteron de la germano nek la spegulon de la franco, sed ŝi havas la drapon de la italo. — Ĉu ŝi havas la anglan drapon? — Ŝi ne havas la drapon anglan, sed hieraŭ ŝi aĉetis tiun de niaj amikoj. — Ĉu la lavistino balais hieraŭ mian domon? — La lavistino ne balais hieraŭ vian domon, sed hodiaŭ ŝi balais vian ĝardenon. — Ĉu li estas gaja aŭ malgaja? — Li estas gaja, sed ŝi estas malgaja. — Ĉu miaj fratoj estas en la kastelo de la markizo? — Nek viaj fratoj nek via patro estas en la kastelo de la markizo. — La balaistoj balais hieraŭ la straton kaj la placon de la urbo. — Kie estas mia bofratino kaj ŝiaj filetoj? — Via bofratino kaj ŝiaj filetoj ludas kaj kuras en la ĝardeno, sed mi tie ne vidas vian patron. — Kiom da kudriloj estas sur la marmora tablo? — Sur la marmora tablo estas kvardek sep kudriloj. — Jen estas mia malgranda hundo kaj miaj blankaj ĝatetoj. — Kiam vi parolis kun miaj kuzinoj? — Hieraŭ, en la teatro. — Ĉu ŝi kuris? — Ŝi ne kuris, sed flugis.

*Tema 17.* Ĉu vi aĉetis hodiaŭ buteron por mia parencino? — Jes, hodiaŭ mi aĉetis buteron por via parencino. — Por kiu estas la verda ĉapeleto? — La ĉapeleto verda estas por mia fili-

neto. — Ĉu la dukineto parolis kun vi en la teatro? — La dukineto ne parolis kun mi en la teatro, sed en la kastelo de la baroneto A. — Ĉu vi vidis ŝiajn hundetojn? — Jes, sinjoro; ŝiaj hundoj kaj ŝiaj katoj estas malgrandetaj. — Ĉu la hundo flugas? — La hundo ne flugas; la hundo ne havasflugilojn. — Kie estas la lampo? — La lampo estas sur la tablo de la kudristino. — Ĉu la muroj de la ĝardeno estas altaj? — La muroj de la ĝardeno ne estas altaj, sed la muroj de la domo de mia amikino estas altaj kaj blankaj. — Ĉu li skribis la leteron? — Li skribis la leteron per verda inko. — Ĉu ŝiaj manoj estas puraj? — Ŝiaj manoj estas malpuraj. — Ĉu ni havas inkon verdan aŭ ruĝan? — Ni nek havas inkon verdan nek ruĝan; ni havas nigran inkon. — Ĉi skribis la bileton per la ruĝa krajono. — La kombistino kun ŝia filineto kombis la markizininon per la arĝenta kombilo. — Ĉu la kulero estas ora aŭ arĝenta? — La kulero estas nek ora, nek arĝenta; la kulero estas fera.

*Tema 18.* Dudek estas la duoblo de dek kaj la kvaroblo de kvin. — La kvinoblo de ok estas kvardek. — La prezo de la drapo estas hodiaŭ duobla. — Ĉi havas tri tranĉiletojn, kvar kombiletojn kaj ok kudrilojn. — Hieraŭ ni tranĉis la sapon per nia plumba tranĉilo kaj kudris la verdajn paperojn per niaj kudriloj. — Kiam ni parolis ŝi iris kun via patrino kaj kun mia bofrato. — Ŝia patrino kantis per bela voĉo kaj mia bofrato parolis per voĉo malgaja sed afabla. — En la fabriko de la anglo estas cent kvardek laboristoj kaj ducent dudek tri laboristinoj. — Ĉi estas ruza, sed fidela. — Vi havas la dekoblon. — La tago estas bela. — Jes, ni estas en somero kaj en somero la tagoj estas agrablaj kaj belaj. — Jen estas mia nigra hundeto. — La kato estas malvarma kaj la teo varma. — Tie mi vidas vian patron. — Ĉu li venas? — Li ne venas; li parolas kun via malbela amiko germana. — Mi ne konas la lingvon italan, sed mi parolas kun mia itala amiko. — Mi ne havas vian plumban kuleron, sed tiun de via amiko. — Ĉi venis kaj parolis kun mi. — Ĉu ŝi venis kun via amikino? — Ŝi venis kun mia amikino kaj aĉetis la verdan papeiron. — Mia patrino estas hispana kaj mia fratino estas franca.

## LECCION 10

*Tema 19.* Ĉu ŝi aĉetas anstataŭ vendi?—Jes, sinjorino; anstataŭ vendi ŝi aĉetas.—Kie estas la kudristino?—La kudristino estas en la salono; ŝi parolas anstataŭ kudri. — Ĉu ŝi parolas bone aŭ malbone?—Ŝi parolas malbone, sed skribas bone. — Ĉu vi ricevis la tranĉilojn por la fabriko?—Mi ricevis la tranĉilojn, sed malfeliĉe ili estas malbonaj. — Ĉu ni vendis la kristalajn botelojn? — Anstataŭ vendi la kristalajn botelojn, ni aĉetis la feran martelon.—Ĉu via ĉambro estas gaja aŭ malgaja? — Feliĉe, mia ĉambro estas gaja. — Ĉu legas bone la infanetoj de la lavistino? — La infanetoj de la lavistino bone legas, sed la infaninoj de niaj amikoj skribas malbone. — Ĉu ili kantis bone aŭ malbone? — Anstataŭ kanti bone, ili kantis malbone. — Ĉu la tago estas malvarma aŭ varma? — Vere, la tago estas malvarma.—Ĉu iliaj paroloj estas malveraj?—Iliaj paroloj ne estas malveraj sed veraj kaj signifaj. — Ĉu iliaj filoj estas feliĉaj? — Iliaj filoj ne estas feliĉaj; ili estas malfeliĉaj.—Ĉu la infaninoj venas? —La infaninoj rapide venas por aĉeti la ĉapeletojn. — Ĉu ŝi kudras? — Ŝi kudras per miaj kudriloj argentaj kaj kombas miajn filinojn per la oraj kombiloj. — Ĉu ili kudras per viaj plumbaj kudriloj?—Ili kudras, sed kudras malbone; per viaj feraj kudriloj ili kudris bone.—Ĉu la infanino de la ĉapelisto balais? — La infanino de la ĉapelisto balais la ĉambrojn per la malgrandeta balailo.—Ĉu ili parolis bone aŭ malbone?—Nek bone, nek malbone.

*Tema 20.* Kiu vokas? — La knabinoj vokas la knabojn. — Kie estis ilia bastono? — Ilia bastono estis hieraŭ sub la marmora tablo.—Kiom da matracoj havas nia lito? — Nia lito havas tri matracojn. — Kie estas la fera ŝtupareto? — Jen estas la fera ŝtupareto. — Kie vi vidis iliajn ĉevalinarojn? — Mi vidis iliajn ĉevalinarojn en la arbaro. — Ĉu vi venis en la vagonaro? — Jes, sinjorino, mi venis en la vagonaro. — Ĉu vi fermis la pordon de la ĝardeno?—Mi ne fermis sed malfermis rapide la pordon de la

ĝardeno. — Anstataŭ fermi, mi malfermis la pordon de la ĝardeno — Ĉu vi vidis hieraŭ la stelaron? — Mi ne vidis la stelaron. — Ĉu vi havas mian oran butonaron? — Ne, via butonaro estas sub la verda papero. — Kiam vi vokis la markizon? — Hieraŭ. — Ĉu vi amas viajn amikojn? — Mi frate amas miajn amikojn kaj la viajn. — Ĉu la baronino estas juna aŭ maljuna? — La baronino estas maljuneta. — Ŝia dentaro estas malbela.

*Tema 21.* Hieraŭ la sinjorino ne estis en la domo, sed hodiaŭ ŝi venis, ĉu vi volas paroli kun ŝi? — Kie ŝi estas? — Ŝi estas en la salono. — Ĉu ŝi kantas aŭ skribas? — Anstataŭ kanti ŝi skribas per via ora plumo kaj parolas gaje kun liaj amikinoj. — Ĉu ŝi bone kantas? — Ŝi kantas bone, per bela kaj agrabla voĉo. — Kiam ŝi parolis kun la anglaj amikoj? — Hieraŭ ŝi parolis kun la amikoj anglaj kaj kun la amikoj de viaj kuzinoj. — Ĉu ŝi konas la lingvon anglan? — Ŝi konas kaj rapide parolas la anglan lingvon. — Ĉu ŝi estas angla? — Ne, sinjoro, ŝi estas germana, sed ŝiaj kuzinoj estas anglaj. — Kie estas ŝiaj infaninoj? — Ŝiaj infaninoj ludas en la ĝardeno kun la fratoj de la vendisto de ĉapeloj. — Ĉu vi vidis hieraŭ la abelaron? — Jes, sinjoro, mi vidis la abelaron kaj aĉetis mielon por miaj najbarinoj. — Kie estas la marteloj kaj la plumoj? — La marteloj kaj la plumoj estas en la sako, sub la lito kaj la boteloj estas sur la tablo.

## LECCION 11

*Tema 22.* Ĉu ni ricevos morgaŭ la ferajn kudrilojn de la ĉapelisto? — Morgaŭ ni ricevos la duonon. — Per kiu ni ricevos la tranĉilojn? — Ni ricevos la tranĉilojn per la infaninoj de la kudristino. — Ĉu ni ricevis ŝian leteron? — Ni ricevis hieraŭ ŝian leteron per mia amiko. — Ĉu vi volas kuri kun mi en la ĝardeno aŭ paroli en la salono kun niaj patroj? — Mi volas kuri kun vi en la ĝardeno. — Ĉu ŝi volas aĉeti la duonon? — Ŝi ne volas aĉeti la duonon, sed la duoblon aŭ trioblon. — Ĉu hodiaŭ estas ĵaŭdo? — Ne, sinjorino, hieraŭ estis vendredo, hodiaŭ



estas sabato kaj morgaŭ estos dimanĉo. — Ĉu vi povos fari la kafon? — Ni povos fari la kafon, sed ni ne havas sukeron. — Kiam ili venos? — Feliĉe ili venos morgaŭ kun niaj amikoj kaj kun la parencoj de mia patrino. — Kie ili estas hodiaŭ? — Hieraŭ ili estis en Madrido, sed hodiaŭ ili estas en Barcelono. — Ĉu vi vokos ŝiajn amikojn? — Mi vokos la du trionojn de ŝiaj amikoj. — Kun kiu ili kantos? — Ili kantos kun la fianĉino de mia bofrato kaj kun la kuzino de mia amiko. — Ĉu la papero estas sur la tablo? — La verda papero estas sur la tablo marmora, sed la blua papero estas sub la matraco. — Ĉu ŝi venis? — Ŝi venis kaj ni parolis antaŭ mia patrino. — Kiom da fianĉoj ŝi havis? — Ŝi havis tri fianĉojn; la unua estis germana, la dua franca kaj la tria hispana. — Kie estas via fianĉino? — Jen ŝi estas.

*Tema 23.* Ĉu la fianĉo aĉetos la oran butonaron? — Li aĉetos la oran butonaron kaj la ferman liton. — Kie estas la fianĉo? — Li parolas kun la fianĉino antaŭ la pordo de la ĝardeno. — Kiu estas antaŭ la reĝa palaco? — Antaŭ la reĝa palaco estas la botistoj kaj la kudristinoj. — Por kiu vi aĉetos morgaŭ la dekonon? — Antaŭ mia domo mi aĉetos morgaŭ la dekonon por miaj filinoj kaj por la filoj de miaj najbaroj. — Ĉu vi volos amelon aŭ buteron? — Mi ne volos amelon nek buteron; mi volos sukeron, panon kaj vinon. — Ĉu vi parolos kun li? — Mal-feliĉe mi ne parolos kun li, sed disputos kaj mi ne volas disputi kun miaj amikoj. — Ĉu la dukino desegnas? — La dukino kantas per bela kaj agrabla voĉo kaj arte desegnas, sed anstataŭ kanti aŭ desegni ŝi kudras kaj lavas. — Ĉu li laboros? — Li laboros kaj faros artajn tablajn por la angloj.

*Tema 24.* Ses estas la duoblo de tri kaj la duono de dekdu. — La tri centonoj de kvarcent estas dekdu. — Kun kiuj ili venos? — Ili venos kun niaj amikoj kaj kun la amikinoj de niaj bofratoj por fari kafon. — Por kiu estos la kafe? — La kafe estos por mi kaj por miaj filoj. — Ĉu ili povos fari teon anstataŭ kafe? — Ili povos fari teon aŭ kafon. — Ĉu ni parolos en la arbaro? — Ni ne povos paroli en la arbaro, sed mi vokos mian filinon kaj miajn bofratinojn kaj ni parolos en la ĝardeno de la

kastelo. — Ĉu ŝi parole vokos niajn amikojn? — Jes, parole; sed ili ne venos. — Ĉu ili ne venos? — Ne, sinjoro, ili estas en Barcelono. — Ĉu ili disputis? — Ili disputis hieraŭ kun la panisto antaŭ mia domo. — Kie estas la markizino? — Ŝi estas en la salono kaj gaje parolas kun miaj infanoj kaj kun la viaj. — Ĉu vi akceptos miajn leterojn? — Mi akceptos viajn leterojn kaj la biletojn de via frato.

## LECCION 12

*Tema 25.* Ĉu vi ricevos morgaŭ la librojn? — Morgaŭ mi ricevos la librojn dekduope. — Ĉu viaj amikoj venis? — Niaj amikoj venis triope kaj parolis kun ni antaŭ niaj fianĉinoj. — Ĉu en la salono? — Ne, en la strato, antaŭ la fenestro de mia domo. — Ĉu ŝi havas la ferajn seĝojn? — Ŝi aĉetis centope la ferajn seĝojn, sed hodiaŭ ŝi vendis la duonon. — Kiom da horoj havas la tago? — La tago havas dudek kvar horojn kaj la horo konsistas el sesdek minutoj. — Kiom da tagoj havas la semajno? — La semajno havas sep tagojn: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. — Ĉu via patro estis en la teatro? — La sinjoro, kiun vi vidis en la teatro, estas mia patro kaj la sinjorino, kun kiu vi parolis estas mia patrino. — Ĉu vi havas la buteron, kiun hieraŭ aĉetis mia nevino aŭ la sukeron, kiun vendis la ĉapelisto kiam li estis en la palaco? — Mi nek havas la buteron, kiun hieraŭ aĉetis via nevino, nek la sukeron, kiun vendis la ĉapelisto, sed mi havas la drapon de la komercisto. — Ĉu vi aŭdis kanti? — Mi aŭdis la markizino; ŝi kantis per voĉo malbela kaj malagraba. — Pri kiu vi parolos? — Ni parolos pri nia onklo kaj amike diskutos, sed ni ne legos la leteron, kiun ni ricevis hieraŭ. — Ĉu estas amiko via la sinjoro, kiun mi vidas tie? — Li ne estas mia amiko, sed li estas amiko de mia kuzo kaj de mia fianĉino.

*Tema 26.* Ĉu ŝia letero estis grava? — Ŝia letero ne estis grava; sed anstataŭ skribi la leteron ŝi volis veni por paroli kun mi pri la komedio, kiun vi legis. — Ĉu ŝi estas juna kaj

bela? — *Ŝi ne estas juna nek bela.* — *Ĉu la infaninoj aĉetos la bluan kofreton?* — *Ili aĉetos la flavan kofreton, kiun ni vidis hieraŭ antaŭ nia domo.* — *Ĉu vi pensos pri nia afero?* — *Unue mi volas paroli kun mia edzino.* — *Ĉu vi aŭdis niajn najbarojn?* — *Mi aŭdis niajn najbarojn; ilia amikeco estas malagrabla.* — *Ĉu liaj kruroj estas longaj?* — *Liaj kruroj estas longaj, sed liaj brakoj estas mallongaj.* — *Ĉu vi aŭdas niajn amikojn?* — *Jes, ili kantas kaj dancas en la placo.* — *Ĉu vi vidas mian filineton?* — *Jes, sinjorino, ŝi brodas kun nia avino kaj kun viaj nevinoj.* — *Kiom da sezonoj havas la jaro?* — *La jaro havas kvar sezonojn; pritempo, somero, aŭtuno kaj vintro.* — *Ĉu vi vidis la ruĝajn vangojn de la knabino?* — *Mi ne vidis la ruĝajn vangojn de la knabino, sed mi vidis la blankecon de la papero.* — *Ĉu la sapo estas mola aŭ malmola?* — *La malmoleco de la sapo estas granda.* — *Kiom da nazoj ni havas?* — *Ni havas unu nazon, du vangojn, du krurojn kaj du brakojn.*

*Tema 27. Kiu venas?* — *La homo, kiun vi vidis hieraŭ, venas.* — *Kie mi vidis hieraŭ la homon?* — *En la salono de la duka palaco.* — *Ĉu vi estas feliĉa?* — *Mi estas malfeliĉa; mi ne havas patrinon kaj mi ne konas la patrinan amon, sed mi amas mian onklinon file.* — *Kiom da soldatoj havas la regimento?* — *La regimento konsistas el mil okcent dudek kvar soldatoj.* — *Ĉu vi volas veni kun mi por vidi la ĉevalinaron?* — *Mi iros kun vi por vidi la ĉevalinaron.* — *Ĉu la infano rompis la paperan ĉevaleton?* — *La infano rompis la paperan ĉevaleton, la ĉapelon rondan kaj la feran kudrilon.* — *Per kio vi rompis la kudrilon?* — *Mi rompis la kudrilon per la martelo.* — *Kie estas niaj amikoj?* — *Ili estas en la ĝardeno, antaŭ la fera pordo; ili traktas pri la grava afero, kiun vi konas.* — *Ĉu ili parolas?* — *Ili ne parolas; ili ĉiam diskutas.* — *Ĉu ŝi havos morgaŭ la tranĉilojn?* — *Morgaŭ ŝi havos la duoblon, ni havos la kvaroblon, sed mia amiko angla, pri kiu mi hieraŭ parolis, havos la centonon aŭ la milonon.* — *Pri kiu vi parolas kun la najbarinoj?* — *Mi parolas kun la najbarinoj pri miaj bofratinoj kaj pri miaj kuzinoj.*

LECCION 13

*Tema 28.* Ĉu via libro estas pli granda ol la mia? — Ĝi estas pli granda ol la via, sed estas malpli bela ol la libro de niaj malamikoj. — Ĉu via nevino kantas pli bone ol la mia? — Mia nevino kantas pli malbone ol la via. — Ĉu ŝia blua vesto estas pli malbona ol la via? — Mia vesto estas pli malbona ol la ŝia. — Ĉu vi venis pli rapide ol ili? — Mi venis pli rapide, sed mi estas malpli kontenta ol ili. — Ĉu vi amas mian bofraton pli ol lia patro? — Mi amas vian bofraton pli ol lia patro. — Ĉu vi amas mian bofraton pli ol lian patron? — Mi amas vian bofraton pli ol lian patron. — Ĉu vi legis la libron pli rapide ol mi? — Mi legis la libron malpli rapide ol vi. — Ĉu vi legis la libron pli rapide ol la bileton, kiun mi skribis? — Mi legis la bileton, kiun vi skribis per blua inko, pli rapide ol la libron. — Ĉu vi estis hieraŭ en la preĝejo? — Mi estis en la preĝejo. — Ĉu vi preĝis? — Mi ne preĝis, sed mi pre os morgaŭ; anstataŭ preĝi mi parolis kun la amiko, kiun vi konas. — Ĉu vi traktos la aferon? — Ni parolos pri li. — Kiom da cigaredoj vi aĉetos? — Ni aĉetos dudek cigarojn kaj cent cigaredojn. — Ĉu la papero estas blua aŭ griza? — Ĝi estas griza, sed mi havas en mia domo flavan paperon. — Kiam venos via patro? — Morgaŭ. — Ĉu vi estas certa? — Jes, mi estas certa. — Kie estas mia frato? — Via frato parolas kun la libristo, antaŭ la librejo. — Kie ni atendos niajn amikojn? — Ni atendos niaj amikojn en la kafejo. — Ĉu vi volas kafon aŭ teon? — Mi volas teon kaj sukeron.

*Tema 29.* Ĉu vi vidis la birdon? — Mi vidis la birdon; ĝiaj flugiloj estas grandaj kaj blankaj. — Kiom da ĉevaloj vi havas en la ĉevalejo? — Mi havas en la ĉevalejo dudek ĉevalojn. — Ĉu vi parolis kun la sekretario? — Mi estis en la sekretariejo por paroli kun la sekretario; sed li ne estis tie. — Kie estas nia amiko? — Li preĝas en la tombejo, antaŭ la tombo de via patrino. — Ĉu ŝi amos ĉiam niajn fratojn? — Ĉiam; mi estas certa. — Kie flugas la birdetoj? — La birdetoj flugas super la arbaro. —

Pri kio vi parolas? — Mi parolas pri la merito de nia amiko; certe, ĝi estas pli granda ol la nia. — Ĉu vi bezonas miajn ĉevalojn? — Hodiaŭ mi ne bezonas viajn ĉevalojn, sed morgaŭ mi bezonas la ĉevalinojn, kiujn vi aĉetis hieraŭ. — Ĉu vi skribas sur la blua papero? — Mi skribas sur la griza papero, per la ora plumo, kiun vi ricevis hieraŭ. — Kie estas miaj birdoj kaj miaj kraĵonoj. — Viaj birdoj flugas super la tablo kaj viaj kraĵonoj estas sur ĝi.

14  
li 7e  
Tema 30. Kiu estas pli alta ol mi? — Mia frato estas pli alta ol vi. — Ĉu vi amas vian bofratinon, pli ol ŝiajn patrojn? — Pli ol ŝia patro. — Ĉu vi amas vian bofratinon, pli ol ŝian patron? — Pli ol ŝian patron. — Ĉu vi vokas las fianĉojn? — Mi vokis la fianĉojn, sed ili ne venis. — Ĉu vi legis la leteron, kiun ni ricevis hieraŭ per la pordisto de la palaco? — Jes; ĝi traktas signife nian aferon kaj tiun de niaj patroj. — Ĉu vi konas la komedion, kiun ni vidos morgaŭ en la teatro A? — Jes, sinjorino; mi konas la komedion, kiun morgaŭ ni vidos en la teatro A; mi parolis pri ĝiaj meritoj kun miaj amikoj. — Kie estas la nigra katineto? — Ĝi estas sub la lito de mia fratino, sed la birdeto flugas super ni. — Ĉu vi vidis hieraŭ la preĝejon de la urbo? — Hieraŭ mi vidis la urban preĝejon kaj mi konis la grandan meriton de ĝia arta beleco.

## LECCION 14

Tema 31. Ĉu vi estus kontenta se vi havus monon? — Se mi havus monon, mi estus feliĉa kaj ĉiam estus kontenta. — Ĉu ŝi legus la bluan libron, se mi parolus kun ŝi? — Se vi parolus kun ŝi, ŝi legus la bluan libron, kiun ŝi ricevis hieraŭ. — Kiel vi desegnas? — Per la blua kraĵono mi desegnas malbone kaj malrapide, se mi havus la kraĵonon nigran mi desegnus bone. — Ĉu vi volas ĝin? — Jes, mi ĝin volas. — Ĉu ŝi estas tiel alta kiel mi? — Ŝi ne estas tiel alta kiel vi, sed ŝi estas pli alta kaj pli bela ol mia fratino. — Ĉu ili venis tiel rapide kiel ni? — Ni venis pli malrapide ol ili kaj ni parolis dum tri horoj kun la ĉapelisto,

kiu estis antaŭ la kafejo. — Ĉu via plumo estas utila? — Mia plumo estas tiel utila kiel la via, sed estas malpli bela kaj arta. — Ĉu li farus la tablojn tiel rapide kiel li faris la seĝojn, kiujn vi vidis en la salono de niaj kuzoj? — Se li estus gaja, li farus la tablojn tiel rapide kiel li faris la seĝojn, sed li estas malgaja kaj ne faros la seĝojn nek rapide, nek malrapide. — Ĉu ŝi kantas tiel bone kiel nia amikino? — Nia amikino kantas pli malbone ol ŝi. — Ĉu ili skribus anstataŭ ludi? — Ili skribus anstataŭ ludi, se vi parolus kun ili.

*Tema 32.* Ĉu vi volas aĉeti pomojn aŭ pirojn? — Mi dezirus aĉeti pomojn. — Kiel estas la okuloj de la birdeto? — La okuloj de la birdeto estas rondaj kaj grizaj. — Ĉu ŝia vesto estas kotona aŭ silka? — Ŝia vesto estas kotona. — Ĉu ŝi intencas fari la veston, kiun ricevis mia patro aŭ tiun de mia frato? — Ŝi intencas fari tiun de via frato, sed mia kuzo helpos al ŝi. — Ĉu vi estos en Madrido dum la vintro? — Ne, sinjoro, dum la vintro mi estos en Barcelono. — Kaj dum la somero, kie vi estos? — Mi estos en Madrido. — Ĉu vi vidis la homon, kiu dancis kun mia kuzino anstataŭ trakti kun vi pri la afero? — Mi lin vidis; sed mi ne povis paroli kun li; se mi parolus kun li ni diskutus pri la merito de la komedio. — Ĉu vi vidis la riverojn aŭ la lagojn? — Mi vidis la lagon, kiu estas en la palaco, sed mi ne vidis riverojn, nek riveretojn. laŭ Lφ  
√ v / d

*Tema 33.* Ĉu vi ŝin vidis? — Mi ne vidis ŝin, sed morgaŭ mi ŝin vidos en la teatro. — Ĉu vi volas la drapon? — Mi ĝin ne volas, se ĝi estus blua mi aĉetus ĝin, sed ĝi estas griza. — Ĉu vi legus la leteron, se vi havus ĝin? — Mi legus la leteron, se mi havus ĝin, sed mi ĝin ne havas. — Ĉu vi amas mian patrinon tiel, kiel mia amiko A.? — Mi amas vian patrinon pli ol via amiko. — Ĉu vi amas mian patrinon tiel, kiel mian amikon A.? — Mi amas vian patrinon malpli, ol vian amikon. — Ĉu li vendis aŭ aĉetis? — Li vendis kaj dum li vendis la duonon mi aĉetis la trioblon, sed li aĉetus anstataŭ vendi se li estus tiel riĉa kiel mi. — Ĉu lia kapo estas malgranda aŭ granda? — Lia kapo estas pli granda ol la mia, sed liaj brakoj kaj kruroj estas tiel mallongaj kiel la miaj. — Ĉu vi havas mian rondan ĉapelon?

— Jes, sinjoro, mi ĝin havas. — Kiam vi ricevos la martelojn kaj la kudrilojn? — Morgaŭ. — Pri kio vi parolas? — Mi parolas pri la edzinoj de niaj amikoj kaj pri la filinoj de niaj najbaroj.

## LECCION 15

*Tema 34* Ĉu vi havas mian piron? — Mi ne havas ĝin. — Ĉu ŝi havas tiujn de miaj geonkloj? — Ŝi havas ilin. — Ĉu miaj gepatroj havas la plej altan ĉevalon? — Viaj gepatroj ne havas la plej altan ĉevalon; ĉiuj estas malaltaj kaj malbelaj. — Ĉu vi vidis la kudrilojn de la kudristino? — Mi ne vidis la kudrilojn de la kudristino; sed mi vidis la kombilojn, kiuj estis hieraŭ sur la marmora tablo. — Ĉu la najbarino skribas aŭ kantas? — Ŝi nek kantas nek skribas; ŝi desegnas sur la papero griza per la blua krajono. — Kiel desegnas miaj nepoj? — Viaj nepoj desegnas tre bone kaj tre rapide. — Ĉu vi konas ĉiujn danĝerojn? — Mi ilin konas. — Ĉu miaj gefratoj estas la plej blondaj? — Viaj fratoj estas la plej blondaj, sed viaj fratinoj estas la plej brunaj. — Kiom da fingroj ni havas? — Ni havas dudek fingrojn; kvin en ĉiu mano kaj en ĉiu piedo. — Ĉu ĉiuj homoj havas barbon? — Ĉiuj homoj ne havas barbon. — Ĉu ili volos manĝi aŭ trinki? — Ili volos manĝi panon kaj pomojn, kaj trinki akvon kaj vinon. — Ĉu vi volus trinki la vinon kun akvo? — Se mi havus akvon, mi trinkus kun ĝi la vinon, sed mi ne havas. — Ĉu vi manĝus se vi havus monon? — Se mi havus monon, mi trinkus anstataŭ manĝi. — Ĉu vi konas la lavistinon? — Jes; mi ŝin konas; ŝia beleco estas ĉarma. — Ĉu vi parolis pri la afero? — Ni traktis pri la grava afero, sed feliĉe ni nek diskutis nek disputis. — Ĉu vi vendis al la profesoro ĉiujn pirojn? — Ne, sed mi ilin vendus al li, se li havus monon. — Ĉu vi estas la plej riĉa? — Malfeliĉe mi estas la malplej riĉa. — Al kiu apartenas la domo? — Ĝi apartenas al miaj gekuzoj. — Ĉu vi legus la leterojn al la studentoj? — Mi legus la leterojn al la studentoj, se mi bone legus. — Kie estas la studento, kiu hieraŭ parolis kun mi? — La studento, kiu hieraŭ parolis kun vi, estas en la universitato.

*Tema 35.* Ĉu vi admiras la honestecon de la knabino? — Mi admiras ŝian bonecon kaj belecon. — Ĉu vi vidis la geflanĉojn en la preĝejo? — Ne, sinjoro, mi ilin vidis en la kafejo, kie mi atendis ilin. — Ĉu lia amo estos konstanta kaj nobla? — Se lia amo estus konstanta kaj nobla, li parolus kun la fianĉino dum la semajno. — Ĉu vi demandas ilin pri la afero aŭ pri la letero? — Mi demandus ilin pri la afero, se mi estus malpli konstanta ol ili, sed mi estas la plej konstanta. — Ĉu li amas mian fratinnon? — Li ŝin adoras. — Ĉu li venos kun la kofro sur la ŝultro? — Li venos kun la kofro sur la kapo. — Ĉu vi vendos la tranĉiletojn al miaj gebopatroj? — Mi ne vendos la tranĉiletojn al viaj gebopatroj, sed mi vendos ilin al la profesoroj kaj al la studentoj de la universitato. — Ĉu viaj gefratoj venis? — Ili ankoraŭ ne venis, sed venos morgaŭ. — Ĉu vi volas manĝi kun ni? — Mi ankoraŭ ne manĝis, sed mi venas por paroli kaj ne por manĝi. — Al kiu vi vendus la ĉevalinnon? — Mi vendus la ĉevalinnon al miaj genajbaroj; se ili volus ĝin aĉeti, sed ili ne volas. — Kie estas la gesinjoroj? — La sinjorino estas en la preĝejo kaj la sinjoro estas en la ĉevalejo. — Kiom da ŝultroj havas ĉiu homo? — Ĉiu homo havas du ŝultrojn kaj unu bruston. — Ĉu ŝi estas ruza? — Ŝi estas la plej ruza, sed estas la malplej riĉa; ŝi estas pli malriĉa ol mia bofratino kaj malpli afabla ol mia nepo. — Ĉu ŝi estas tre kontenta? — Jes; ŝi estas tre kontenta.

*Tema 36.* Ĉu la vagonaro venis? — La vagonaro ankoraŭ ne venis; malfeliĉe, ĝi ne venos hodiaŭ nek morgaŭ. — Ĉu vi trinkus la duoblon se vi volus? — Se mi volus, mi trinkus la duoblon kaj la trioblon. — Al kiu apartenas la du trionoj de la domo. — La du trionoj de la domo apartenas al miaj gepatroj. — Ĉu vi ricevus la monon, se mi skribus la leteron? — Se vi skribus la leteron mi ricevus la monon. — Ĉu ŝi estas ĉiam kontenta? — Ŝi ĉiam estas kontenta. — Ĉu vi skribis al ili? — Mi skribis al ili leteron, sed ankoraŭ ili ne ĝin ricevis. — Vivi por morti; jen estas la laboro de ĉiu homo dum li vivas. — Ĉu vi vidas la anglan amikon? — Konstante mi lin vidas, sed hodiaŭ ankoraŭ mi ne vidis lin. — Ĉu vi iras al la domo? — Ni ne iras



al la domo, ni iras al la kastelo de la amiko kun kiu vi parolis hieraŭ antaŭ nia domo, kiam ni diskutis pri la libro. — Ĉu li estas ĝentila? — Li estas tre ĝentila, sed mia kuzo estas pli ĝentila ol li. — Ĉu via fratino estas feliĉa? — Mia fratino estas la malplej feliĉa, sed ŝi estas la plej konstanta. — Ĉu vi parolas kun la plej bruna? — Mi parolas kun la malplej blonda. — Ĉu niaj amikoj venis? — Jes, sinjorino; ili venis kvarope.

## LECCIÓN 16

*Tema 37.* Ĉu li eliris el la palaco? — Li ne eliris el la palaco, sed li elirus se li volus. — Ĉu vi vidis la paniston kiam li eliris el via domo? — Dum mi parolis kun miaj gepatroj, li eliris el mia domo. — Ĉu vi aĉetis hieraŭ ĉapelon? — Hieraŭ mi aĉetis ĉapelon por mia filo kaj veston por mia filino, sed la ĉapelo ne estas tiel bela kiel la vesto. — Ĉu la hispano, kiun ni vidis hieraŭ estas komercisto? — La hispano, kiun ni vidis hieraŭ, estas dentisto. — Ĉu mia amiko povas eniri? — Via amiko povas eniri, sed li ne povos eliri. — Kun kiu ni parolis hieraŭ? — Hieraŭ ni parolis kun urbestro. — Ĉu ni lin konas? — Ni ne konas lin kaj li ne volas veni kun ni. — Ĉu vi mangos morgaŭ kun la imperiestro? — Morgaŭ mi mangos kun la imperiestro kaj mi legos al li la leteron, kiun mi ricevis de mia regimentestro. — Ĉu la ŝipo venos ankoraŭ hodiaŭ? — Anstataŭ veni hodiaŭ, ĝi venos morgaŭ. — Ĉu vi estas certa? — Jes, sinjoro; hieraŭ mi ricevis leteron de la ŝipestro. — Pri kiu parolas niaj amikoj? — Niaj amikoj parolas pri niaj fianĉinoj, sed la poliestro parolas pri la ĉevalo, kiu hieraŭ estis antaŭ nia ĝardeno. — Kiu estas la plej riĉa el ĉiuj niaj kuzoj? — La plej riĉa el ĉiuj niaj kuzoj estas Antono, sed lia riĉeco estas ankoraŭ pli malgranda ol lia nobeleco. — Kiom da diamantoj havas la imperiestrino? — La imperiestrino vendis al mi la diamantojn, kiujn ŝi havis; hodiaŭ ŝi estas tiel malriĉa kiel vi. — Kie estas mia kraĵono? — Ĝi estas inter la libroj, kiuj estas sur la fera tablo. — Ĉu la profesoro estas severa? — La severeco de la profesoro estas tiel granda kiel la gajeco de la studentoj.

— Kie estis la letero, kiun ni ricevis hieraŭ el Barcelono? — La letero, kiun ni ricevis hieraŭ el Barcelono, estis inter miaj aferaj paperoj.

*Tema 38.* Kiel vi fartas, sinjorino? — Tre bone. — Mi ne fartas bone, malfeliĉe. — Mi neniam fartas bone. — Ĉu vi nin vidis hieraŭ en la teatro? — Ne, sinjoro; mi vidis vin kontraŭ la palaco de mia kuzino, inter la studentoj, kiuj eliris el la universitato. — Ĉu li estas severa? — Li estas severa, sed lia edzino estas tre malsevera. — Ĉu ŝi amas min? — Ŝi via amas. — Ĉu vi vendos al mi ĉevalon? — Mi ne povas vendi al vi ĉevalojn nek hundojn, sed mi vendos ĉevalinon al vi. — Ĉu vi nia konas? — Mi konas vin, sed mi neniam parolis kun vi. — Pri kiu parolas la poliestro? — Li parolas pri ĉiuj miaj geparencoj. — Kie estas la urbestro? — Tie li estas, kontraŭ ni. — Ĉu vi parolos kun li pri nia afero? — Mi ne parolos kun li. — Ĉu vi konas mian onklinon Antoninon? — Ne, sed ŝi min konas. — Ĉu vi vidas miajn birdetojn? — Jes, sinjoro, hieraŭ ili flugis inter la arboj de mia ĝardeno, sed hodiaŭ ili flugas super mia domo. — Kie estas mia blanka katineto? — Via katineto blanka estas sur mia tablo; dum la birdoj flugas, ŝi manĝas. — Ĉu via bofratino nin vidos? — Se ŝi venus, ŝi vidus nin.

*Tema 39.* Kiom da vortoj havas via blua libro? — Nia libro blua havas dumil kvarcent kvindek ok vortojn. — Ĉu ŝi havas ĉiujn miajn librojn? — Ŝi havas ĉiujn viajn librojn kaj ĉiujn miajn. — Ĉu vi havas ĉiujn miajn? — Mi ne havas ĉiujn viajn; sed mi havas ĉiujn de miaj geamikoj. — Ĉu vi venos? — Mi neniam venos. — Kie vi estos? — Inter miaj amikoj. — Ĉu vi eniros? — Ni enirus, se ni estus amikoj. — Ĉu li vidus nin, se ni enirus? — Se ni enirus, li ne vidus nin. — Kiel vi fartas? — Mi malbone fartas. — Ĉu vi parolas kun nia amiko? — Mi neniam parolas kun li, sed mi ĉiam lin vidas en la teatro. — Ĉu vi legos la libron? — Mi ne legos ĝin. — Nia regimentestro estas la plej malsevera el ĉiuj, li nin amas kaj parolas tre amike kun ni. — Via kafo neniam estas tiel bona kiel la nia. — Ili venis kontraŭ ni unuope. — La estro de la urbo estas la urbestro kaj la geestroj de la imperio estas la geimperiestroj. — Dume ni povas lavi la vestojn per la mola

*In* sapo, kiun hieraŭ aĉetis nia onklo.—La severeco kaj la malseverececo estas du ecoj kontraŭaj.

## LECCIÓN 17

*Tema 40.* Ĉu vi volas, ke ŝi kantu?—Mi volas, ke ŝi kantu kaj ke vi manĝu.—Ĉu vi parolis kun li? — Mi parolis kun li kaj li diris al mi, ke vi ne skribu la leteron kaj ke li esperas ricevi morgaŭ la monon.—Ĉu vi kredas, ke lia frato parolos? — Mi ne kredas, ke lia frato parolos; mi volas, ke li kantu anstataŭ paroli.—Ĉu vi legos al ni la leteron, kiun vi ricevis? — La letero estas nelegebla; mi ne povas legi ĝin al vi.—Ĉu estas eble, ke la libro; kiun donis al ni la barono, estas netradukebla? — Estas neeble; ĉiu libro ĉiam estas tradukebla.—Ĉu la ĉielo estas blua? —Ne, ĝi estas griza.—Ĉu vi vidis la vizaĝon de mia patro?—Jes, via patro estis videble malkontenta. — Ĉu vi donos al mi la glavon aŭ la ponardon?— Nek la glavon nek la ponardon. — Ĉu vi scios direkti la aferon?—Mi ne scios ĝin direkti kaj hieraŭ, kiam mi parolis kun via patro mi diris al li, ke neniu povos ĝin direkti; mi kredas ke ĝi estas nefarebla. — Mi volas, ke vi venu morgaŭ por manĝi kun ni kaj kun niaj amikoj. — Mi dankas vin, sed morgaŭ mi ne povos veni; estas neeble.—Mi ne toleras ke vi ne manĝu morgaŭ inter viaj veraj amikoj; ni atendas vin en la saloneto kaj kiam vi venos, tiam ni manĝos. — Viaj diamantoj brilas pli ol la miaj.—Ĉu vi vidis la ostojn, kiuj estas en la ĝardeno? —Jes, sinjorino; mi vidis la ostojn.

*Tema 41.* Ĉu vi havas la glavon de la imperiestro? — Mi ne havas la glavon de la imperiestro, sed mi havas tiun, kiun mi aĉetis hieraŭ.—Ĉu vi atendas miajn amikojn?—Ne, sed mi atendas tiujn, kiujn ni vidis hieraŭ kontraŭ la teatro. — Ĉu viaj gepatroj tradukis la leteron de la franco? — Ili tradukis ĝin, se ili scius; anstataŭ traduki la leteron de la franco, ili tradukis la leterojn, kiujn ni ricevis hieraŭ el Madrido. — Ĉu ili havas tiujn, kiujn ni aĉetis hieraŭ? — Ili havas tiujn, kiujn ni aĉetis hieraŭ kaj tiujn, kiujn havis miaj bofratinoj, sed ili ne havas

tiujn de miaj kuzoj.— Ĉu li estas surda aŭ muta? — Li ne estas surda nek muta, sed li ne volas paroli kun ni pri la afero. — Ĉu vi volas doni al mi la paperojn, kiuj estas sub la blua libro? — Hodiaŭ ne, sed kredeble morgaŭ mi donos ilin al vi. — Ĉu vi povas diri al mi, kie estas miaj geinfanoj? — Jes, sinjorino; ili ludas en la placo, antaŭ la kafejo.—Mi dankas vin.

*Tema 42.* La rondeco de la tero estis tiam nekredebla. — Ne skribu per la ruĝa kraĵono; skribu per nigra inko.—Traduku la leteron.—Diru al ili, ke ili venu.—Ne malamu viajn malamikojn.— La lango de la hundo estas pli ruĝa, ol la lango de la kato. — Neniu nin dankos. — Ni ne toleru, ke la gefloj de niaj genajbaroj ludu en la ĝardeno. — Tiam ni povos aĉeti glavojn kaj ponardojn.—Majo estas la plej bela monato el la jaro. — La kafo estas malvarma. — Neniam nia onklino diros, kie ŝi havas la monon.— Hieraŭ mi parolis kun la ŝipestro kaj li diris al mi, ke ni ne aĉetu la birdetojn de la libristo sed tiujn, kiujn havas la markizo. — Neniu povas diri ke mi havas ilin. — La homoj bonaj ĉiam diras la veron.— Kiam vi venos, tiam ni parolos. — Infanoj, ne kuru.— Ŝi skribas nelegeble, sed rapide.— Ni havas kombilojn tiel beletajn kiel la viaj, sed malpli longajn ol la kudriloj de la ĉapelisto. — Ĉu vi ricevis la rondajn ĉapelojn? — Ni ricevos ilin morgaŭ, sed vi povas aĉeti al ni tiujn, kiujn ni hieraŭ ricevis.—Ĉu ili estas rondaj? — Ne, sinjoro.— Ĉu vi volas doni al mi unu el la kristalaj boteloj, kiuj estas sur la tablo? — Jen ĝi estas.— Kiam la malfeliĉo okazis? — La malfeliĉo okazis hieraŭ.

## LECCION 18

*Tema 43.* Ĉu tiu ĉi papero estas pli granda ol tiu? — Tiu ĉi papero estas malpli granda ol tiu, sed ĝi estas pli bela. — Ĉu vi konas la finon de tiu komedio? — Mi ĝin konas. — Ĉu vi traktos parole la aferon? — Ni faros la eblon. — Ĉu ili ricevis la tranĉilojn? — Kune kun la kudriloj, ili ricevis la tranĉilojn. — Ĉu vi preferas teon ~~an~~ kafon? — Mi preferas teon. — Ĉu li — *aii*

volas paroli kun mi aŭ kun mia filino? — Prefere li volas paroli kun via filino. — Kie estas mia ĉapelo kaj mia bastono? — Via ĉapelo estas tie kaj via bastono estas tie ĉi, sub la vesto. — Ĉu ŝi aĉetos tiujn ĉi plumojn aŭ tiujn? — Tiujn ĉi ne, sed tiujn. — Ĉu ŝi aĉetos pli ol ni? — Jes; ŝi aĉetos tiujn de niaj onkloj kaj tiujn, kiujn ni vidis hieraŭ en la librejo. — Ĉu via horloĝo estas ora aŭ argenta? — Ĝi ne estas ora, nek argenta, ĝi estas fera. — Ĉu Antono fermis la fenestrojn? — Li fermis la fenestrojn, kiuj estas en la salono, sed ne la pordon. — Ĉu tie estas lumo? — Ne. — Kiam mi diris ke mi ne aĉetos la ĉevalojn, miaj filoj ekploris kaj tiam mi eliris por aĉeti ilin. — Ĉu vi ekkuris. — Austataŭ ekkuri mi ektemis. — Li min vidis kaj ekparolis sed mi ne aŭdis liajn vortojn. — La tieaj studentoj estas tre kontentaj. — Kiam vi ekmanĝis? — Ni ekmanĝis kiam mia patro venis. — Mi ekmovus la tablon, se mia frato estus tie ĉi, sed li ankoraŭ ne venis. — Ĉu vi volas trinki glason da brando? — Dankon. — Ĉu vi havas glasojn de vino? — Ĉu grandajn aŭ malgrandajn? — Malgrandajn. — Jen ili estas. — Kiom da funtoj mi aĉetos? — Aĉetu tri funtojn. — Ĉu vi vendos al mi ok metrojn da drapo? — Jes, sinjorino. — Ekkuru!

*Tema 44.* Ĉu via oleo estas pli bona ol la mia? — Ĝi ne estas pli bona, sed pli malbona. — Ĉu niaj cigaroj estas pli mallongaj ol la iliaj? — Ili estas pli mallongaj ol la iliaj, sed malpli mallongaj ol la miaj; la cigaroj de mia patro estas ankoraŭ pli longaj. — Ĉu ilia ĉevalo ne estas tiel bela, kiel la mia? — Ĝi estas tiel bela kiel la via, sed la mia ne estas tiel bela. — Mia kuzo Antono havas unu ankoraŭ pli belan. — La nia estas la plej bela el ĉiuj. — Ĉu estas tre alta la hundo, kiun ni vidis hieraŭ? — La hundo, kiun ni vidis hieraŭ, estas tre alta. — Ĉu vi havas pli da amelo ol da sukero, se vi aĉetus al mi la mian? — Se ni aĉetus la vian, ni havus pli da amelo ol da sukero. — Ĉu ŝi estas tiel blonda kiel mi? — Ŝi estas la plej bruna. — Ĉu vi vidis du horloĝojn pli malgrandajn, ol tiuj ĉi? — Mi havas tiom da horloĝoj kiel vi, sed neniu estas tiel malgranda. — Ĉu ili aĉetis pli da oleo, ol da petrolo? — Ili aĉetis malpli da oleo, ol da petrolo. — Kiu havas malpli da rizo, ol ni? — La plej maljuna havas

malpli da rizo, sed la plej juna havas pli da vino, ol ni. — Kiu estas la plej riĉa el niaj amikoj? — La plej riĉa estas Antono; li havas pli da mono, ol ni ĉiuj. — Hodiaŭ mi ricevis malpli da leteroj, ol hieraŭ.

*Tema 45.* Mi ricevis dekduon da kuleroj. — Okcent dudek kvar konsistas el ok centoj, du dekoj kaj kvar unuoj. — Kiom da pano volas la knabo? — La knabo ne volas panon, li volas aĉeti dudek litrojn da oleo. — Ĉu la komercisto havas tiom da mono, kiom la panisto? — Li havas pli da mono, ol la panisto. — Ĉu li estas severa? — Li estas tiel severa, kiel afabla estas nia kuzino. — Kie estas la avineto? — La avineto estas en la ĝardeno, ŝi donas panon al la kokinoj. — Ĉiuj diras, ke la geedzoj estas malfeliĉaj. — La ĉevalo, kiun ni aĉetis hieraŭ, estas malgranda, sed tiu ĉi estas granda. — Ĉu vi vidas ilin? — Ĉiam mi vidas ilin antaŭ la palaco; ili parolas pri niaj najbaroj dum la infanoj manĝas. — Ankoraŭ mi ne vidis ilin, sed kiam mi ilin vidos, mi legos al ili la leteron, kiun hieraŭ mi ricevis. — Neniu venos kun mia frato. — Mi lin amas kiel amikon.

## LECCIÓN 19

*Tema 46.* Ĉu nia kuzo sendis al ni la kudrilojn? — Li sendis al ni la ventumilojn kaj la ŝuojn. — Ĉu vi volas doni al mi glaseton da brando? — Ni ne povas doni al vi glaseton da brando, sed la najbaro, kiu estas en la balkono, ĝin donos al vi. — Ĉu vin salutas la markizo? — Li nin salutas sed ni ne volas akcepti lian saluton; la homo, kiu nin ofendis tiel grave, ne estas amiko nia. — Li trankviligis la familion kaj skribis al mia patro longan leteron. — Ĉu li parolis? — Li parolis kaj liaj vortoj trankviligis nin. — Kiel vi malpurigis vian veston? — Ni ne scias, sed se ĝi estas malpura, mi ĝin lavos morgaŭ. — Purigu viajn manojn. — Ĉu vi povas certigi al mi, ke la domo apartenas al mia patro? — Mi certigas al vi, ke la domo apartenas al via patro; li ĝin aĉetis kaj beligis. — Venigu mian amikon, mi volas paroli kun li kaj legi al li trankviligan leteron. — Ĉu vi scias kiu mortigis

lin? — Jes, sinjoro, la ŝuisto mortigis lin en la ĝardeno. — Tiu ĉi metalo estas tre malmola, estas neeble, ke vi ĝin moligos. — Ĉu ŝi iris kun la kruĉo al la fonto? — Ŝi iris al la fonto, sed ne kun la kruĉo. — Ĉu li volas ŝtonojn? — Li ne volas ŝtonojn; li volas aĉeti dudek kvin milojn da brikoj por fari domon. — Kiu venas? — La amiko, kies flroj venis hieraŭ. — La komercisto, kies edzino parolis kun ni. — La urbestro, kies amiko ofendis nin. — La ŝipestro, al kies kuzoj ni skribis hieraŭ.

*Tema 47.* Kiuj estis? — La najbaroj, kies flroj ludis en la ĝardeno. — La artistoj, kies amikoj tiom amas nin. — La soldatoj, kies regimentestron ni vidis hieraŭ. — Ĉu li insultis vin? — Li insultis min ĉe mia patro. — Ĉu vi manĝos morgaŭ ĉe mia kuzino? — Morgaŭ mi manĝos ĉe via kuzino, se mi povus. — Ĉu vi legas la gazeton? — Mi ĝin legas ĉiusemajne. — Ĉu vi ĵuras? — Jes, mi ĵuras ke ĉiutage mi iros por plori sur lia tombo. — Miaj vortoj paligis lin. — Ĉiujare mi dankas lin kaj ĉiujn, kiujn mi konas. — La gazetisto skribas al mi ĉiumonate longajn leterojn, sed mi ne legas ilin. — Ĉu vi laborus ĉiutage, se vi havus monon? — Se mi havus monon, mi ne laborus ĉiutage. — Nun mi povas diri al vi, kiom da oleo mi aĉetis. — Ĉu la balkono estas tiel alta, kiel la galerio? — Ne, sinjoro, la galerio estas pli malalta. — Ĉu li skribas tiel bone kiel antaŭe? — Ne tiel bone. — Ĉu vi nun povas diri al mi, kiu venos? — Kredeble venos mia onklo, sed mi ne certigas al vi, ke li venos. — Ĉu vi volas, ke mi skribu al li? — Ne, via letero ne venigus lin. — La knabo ĵetis ŝtonon al la lavistino kaj ŝin insultis. — Kie ŝi estas? — Ŝi ĉiam estas ĉe mi, ŝi kombas mian fratineton per la ora kombilo.

*Tema 48.* La tri kvaronoj de miaj libroj estas ĉe li. — Ĉu tiu ĉi bileto havas tiom da vortoj, kiom tiu? — Ne, tiu havas pli. — Ĉu ili ricevis sciigojn de la francoj? — Ankoraŭ ne. — Kie vi estis tiam? — Tiam mi estis ĉe mia patro, sed nun mi estas ĉe mia najbaro. — Ĉu vi vidis la geflanĉojn? — Mi vidis ilin en la kafejo. — Iliaj vortoj ekstremigis nin kaj paligis niajn vizaĝojn. — Ĉu vi vidis la feran kruĉon, kiu estis sur la tablo? — Neniam mi vidis ĝin. — Li mortigis mian amikon per la malgrandeta ponardo, kion vendis al li la studento. — Ĉiuhore li parolas pri mia filo,

sed neniu volas aŭdi lin. — Kiom da leteroj ŝi ricevis? — Tiom, kiom vi. — Ĉu vi parolis kun la komercisto, kies drapon ni aĉetis. — Ne, sinjoro, sed mi diskutis kun la bofrato de la ĉapelisto. — La sciigoj, kiujn mi ricevis el Madrido estas kontraŭaj.

## LECCIÓN 20

*Tema 49.* Ĉu la legantino povos brosi mian veston apenaŭ ni finos. — Apenaŭ ni finos la legantino parolos kun la amanto, sed ne brosos vian veston. — Kie estas la batalantoj? — La batalantoj estas en la ĝardeno aŭskultante nian estron, kiu apenaŭ nin konas. — Ĉu tiu knabo estas blinda kaj lama? — Ne, sinjorino, li estas surda kaj muta, sed la promenanta infano estas blinda. — Kie li estas promene (aŭ promenanta)? — En la ĝardeno, ĉirkaŭ la fonto. — Ĉu okazis la batalo? — Jes kaj en ĝi mia amanta frato ricevis mortigan vundon. — Ĉu estas tre alta la knabo, kiu brosas vian ĉapelon? — La knabo, kiu brosas mian ĉapelon ne estas tre alta. — Ĉu vi ĉirkaŭis per arboj vian ĝardenon? — Mi ĝin ĉirkaŭis per arboj. — Ĉu li estas aĉetanto de bulboj? — Ne, sinjoro, li estas vendanto de citronoj. — Ĉu vi konas la dancantojn? — Jes, sinjoro, ĉiuj estas kuzoj miaj, sed ili ne dancas tie ĉi tiel bone, kiel ĉe mi. — Kial la gefianĉoj promenas tra la ĝardeno? — Ni ne scias kial la gefianĉoj promenas tra la ĝardeno. — La cervo kaj la cigno estas du belaj bestoj. — Ĉu la kantantino havas monon? — Ŝi havas tri orajn monerojn. — Sablero blindigis lin. — Ĉu tiuj sinjoroj havas tiom da hordeo, kiom da aveno? — Ili havas malpli da hordeo, ol da aveno. — El la fajro eliris tiom da fajreroj, ke ni ne povis esti apud ĝi. — Ŝi tiel bone brosis miajn vestojn kaj mian ĉapelon, ke vi ne trovos en ili pulveron. — Ĉu vi volas doni al mi arĝentan monereton? — Prenu ĝin. — Dankon.

*Tema 50.* Ĉu vi legis al ili la leteron? — Apenaŭ eliris mia onklino mi eklegis la leteron, kiun mi ricevis de la urbestro. — Mi ekstremis vidante tiom da leonoj ĉirkaŭ mia domo, tiom da cervoj kurantaj tra la ĝardeno kaj tiom da cignoj apud la fonto.



—Tiam mia patro diris: el kie eliris tiom da bestoj?— Ĉu ŝi malpurigis la paperon? — Ŝi nigrigis la paperon per la karbo, kiu estis sur la tablo.— Kial ŝi nigrigis ĝin? — Mi ne scias kial.—Mi ne scias la kialon. — La jaroj maljunigas la homon. — Ĉu vi havas tiujn, kiujn mi aĉetis apud mia domo? — Ne, sinjoro, mi havas tiujn, kiujn mi aĉetis apenaŭ venis niaj gepatroj. — Kiam kombos la lavistino mian filinon?— Apenaŭ eliros ŝiaj gepatroj. — Ĉu vi povas diri al mi, kial vi estis parolante kun mia amiko apud la tablo? — Ankoraŭ mi ne povas diri al vi, kial mi parolis kun li. — Kie vi estis hieraŭ? — Ni estis eu la promenejo. — Ĉu estas trinkebla la akvo de la fonto de la ĝardeneto? — La akvo de la fonto de la ĝardeneto ne estas trinkebla.— Donu al mi sukeron por dolĉigi la kafon.

*Tema 51.* Ĉu vi estas plorante (aŭ plorantaj)?—Ne, sinjoro, ni estas parolante (aŭ parolantaj) pri la hodiaŭaj sciigoj. — Ĉu la lavistino estis purigante (aŭ puriganta) mian veston, kiam mi eniris?—Ŝi estis kudranta (aŭ kudrante) ĉe miaj gepatroj. — Ĉu la teo estas dolĉa?—La teo estas maldolĉa.—Ĉu vi estos tie ĉi, kiam mi venos? — Kiam vi venos, mi estos manĝante (aŭ manĝanta); tiam ni trinkos glaseton da dolĉa vino. — Mi volas ke, kiam eniros mia bofratino, vi estu skribanta (aŭ skribante) longan leteron al mia avineto.—Ĉu vi estus manĝante (aŭ manĝanta), se vi havus panon?—Se mi havus panon mi estus manĝante (aŭ manĝanta).—Ĉu venos morgaŭ la ŝiparo?— Kredeble ne; la ŝiparestro skribis al mi kaj diris, ke ĉiuj ŝipoj ne venos. —Kiel manĝas tiu knabino?—Tiu knabino manĝas per la maldestra mano.—Ĉu nin vidis la markizino?—Ŝi ne vidis nin, sed ŝi vidis niajn amikojn.—Jen la lavistino; kies filo ĉiam estas trinkante (aŭ trinkanta) brandon. — La ĉiutaga pano. — Ĉiuj bestoj ne estas manĝeblaj.

## LECCIÓN 21

*Tema 52.* Ĉu estas tie ĉi la knabeto aĉetinta mian ĉapelon? —La knabeto aĉetinta vian ĉapelon ne estas tie ĉi; li ne venos

ĝis morgaŭ.—Ĝis kiam?—Ĝis la sabato.—Ĉu la poliestro konas la mortiginton? — La poliestro ne konas la mortiginton, sed li havas amikojn, kiuj lin konas. — Makulinte mian veston, la infanino eliris kurante el mia domo kaj venis ĝis tie ĉi.— Kiam mortis la kulpiginto de miaj geonkloj? — La kulpiginto de viaj geonkloj mortis en la jaro mil-okcent-naŭdek-kvara. — En tiu jaro ankaŭ mortis mia frato Antono.—Kio okazas al vi?—Okazas al mi, ke mi ne povas skribi la leteron pro la inko. — Ĉu estas malbona tiu ĉi inko? — Ĝi ne sole estas malbona, sed malbonega. — Kion vi estis faranta, kiam mi vin vokis? — Kiam vi min vokis mi estis farante la teon por mia patro. — Ĉu vi povus almenaŭ diri al mi, kion ŝi diris, kiam ŝi ricevis mian leteron?—Ŝi nur diris, ke la letero estis nelegebla.— Ĉu vi venas kun mi ĝis la teatro? — Mi ne povas pro mia farto. — Kial li ne salutas vin? — Diskutinte miajn aferojn kaj parolinte pri mia familio, li neniam salutas min. — Kial vi ne eliris hieraŭ el via domo?—Pro la vento.—Ĉu ĝi timigis vin?—Jes, sinjoro, la vento timigis min.

*Tema 53.* Ĉu la suno estas pli granda ol la luno? — Jes: la suno estas pli granda ol la luno, sed la stelo, kiu estas nun super niaj kapoj estas ankoraŭ pli granda ol la suno. — Ĉu vi volas trinki kun mi glaseton da likvoro? — Mi ne povas trinki likvorojn pro mia farto. — La fruktoj de tiuj ĉi arboj estas tre dolĉaj, sed la legomoj de mia ĝardeno ne estas manĝeblaj.—La knabo leginta nian libron estas humila, sed tre lerta; li neniam parolas kaj ĉiam estas laborante (aŭ laboranta).— Ĉu estas grandaj la oreloj de la knabineto? — La oreloj de la knabineto estas tre malgrandaj. — Ĝis kiam mi atendas miajn amikojn?—Ĝis la vendredo.—Ĉu vi vidis la patron de la kudristino? — Jes, sinjoro; li estas mortanta. — La mortanto malfermis la okulojn kaj nur diris: filoj miaj! — Ĉu tiu profesoro konas la mortintajn lingvojn? — Li konas ĉiujn mortintajn lingvojn.— Kial venis la edzino de la komercisto? — Batinte mian filon, ŝi venis por diri al mi, kial ŝi lin batis. —Ĉu vi povos vendi al mi tri metrojn da ŝnurego? — Mi ne havas ŝnuregojn; mi nur havas ŝnuretojn. — La akvo estas varmeta, la kafo varma kaj la teo varmega.—Tiu

Ĉi kafo estas tre malvarma; ĉu vi povas ĝin varmigi? — Mi ne havas fajron por varmigi tiun kafon. — Kio estas la edzo de la lavistino? — La edzo de la lavistino estas ĉasisto de leonoj.

*Tema 54.* Bonan tagon mi deziras al vi! — Bonan tagon! — Kiel vi fartas? — Mi fartas bone, kaj vi? — Mi ankaŭ bone. — Kie estas via familio? — Mia familio eliris por aĉeti al mi bastonon kaj promenigi la infanon. — Kun kiu eliris via familio? — Ĝi eliris kun miaj amikoj, anstataŭ eliri kun miaj amikinoj. — Ĉu ili aĉetos la ĉemizejojn, kiujn havas la komercisto aŭ tiujn, kiujn ni vidis en la ĉemizejo? — Nek tiujn, kiujn havas la komercisto, nek tiujn, kiujn ni vidis en la ĉemizejo; kredeble ili aĉetos la blujajn. — La vendinto eliris tiam el la domo. — La ĉevalo kurinta en la placo estas la mia. — Kion vi estos faranta, kiam mi eniros? — Kiam vi eniros mi estos manĝante (aŭ manĝanta) kaj tiam mi donos al vi botelon da dolĉa vino.

## LECCIÓN 22

*Tema 55.* Se li estus honorinta miajn gepatrojn, nun miaj filoj honorus lin. — Ĉu ili estus dezirintaj paroli kun li? — Ambaŭ estus dezirintaj paroli kore kun li, por proponi al li niajn servojn. — Vi eraras, ili nur volis postuli de li vorton de honoro. — Mi petas ke vi pardonu mian eraron sed mi neniam estus kredinta tion. — Kalkulu kiom da vortoj havos la letero. — Ĝi havos preskaŭ tiom, kiom nia libro. — Li estus volinta profundigi ankoraŭ pli, se tiam li estus havinta ilojn por fari tion. — Kiu estus kredinta, ke li konsentos elekti prezidanto, kiam nur paroli al li pri tio tremigis lin? — Jes, estas vero: sed sen la helpo de la societanoj ni ne estus povintaj fari la elekton. — Tri foje mi proponis lian nomon kaj mi vidis ke, efektive, la afero estis preskaŭ nebla; tiam, nur tiam, ni bedaŭris esti trompinta la elektantojn. — La vilaĝanoj estas tre ruzaj kaj se ili estus volontaj, tio ne estus okazinta. — Ĉu vi faras al mi la plezuron? — Ĉu vi volas mezuri tiun ĉi drapon? — Kun plezuro. — La soldatoj manovris antaŭ la estroj, dum miaj amikoj komentariis la scii-

gojn de via revuo. — La bedaŭrinda sciigo pri la morto de ŝia frato konsternis nin. — La ŝipestro ordonis la ŝipanojn, ke ili preparu la ŝipon por la batalo kaj li maljuste minacis ilin.

*Tema 56.* Ĉu vi estos leginta la libron, kiam venos mia patrino? — Mi konsideras neeble legi tiel grandan libron, sed mi intencos tion. — La homoj bonaj ne malbenas la malamikojn; ili pardonas ilin. — La amantinoj de mia frato estas nekalkuleblaj; sed mi kredas, ke ĉiuj ne amas lin kore. — Ĉu ili manĝis panon? — Ili trinkis brandon kaj akvon de tiu fonto. — Mi nek aprobas nek malaprobas tion, sed mi en lia loko ne estus komparinta la gajnojn; la avareco ne estas bona administranto. — Ni ne estus traktintaj ilin tiel maljuste, se ni estus sciintaj la veron; hodiaŭ la afero ne dependas de ni, sed ni faros la eblon por plezurigi vin. — Adiaŭ, miaj amikoj, ĝis la sabato.

*Tema 57.* Kial vi estas malkvieta? — Mi diros al vi la kialon; mia patro ordonis, ke mi skribu leteron al miaj geonkloj, sed venis miaj amikinoj kaj ni ektudis en la ĝardeno; nun mi timas, ke kiam mia patro venos, ankoraŭ mi ne estos povinta skribi la leteron. — Ĉu vi volas, ke mi vin helpu? — Dankon, vi estas tre ĝentila, sed per kio vi povus min helpi? — Efektive, sed se estus eble mi farus tion kun plezuro. — Kion vi farus estante en mia loko? — Mi ekskribus la leteron kaj tial, kiam via patro venos, mi estus skribinta se ne la tutan leteron almenaŭ la duonon. — Bone, mi faros tion; la ideo estas tre bona. — Miaj aŭdantoj akompanis min ĝis mia domo kaj dum mia servisto razis min, ili estis en la salono legante revuojn. — Ĉu vi volas puŝi la pordon? — Jes, sinjoro. — Mi estis broŝinta mian ĉapelon, kiam venis mia kuzino promenigante mian filinon; tiam ni eliris kune. — Donu al mi la leterojn; kiam vi venos morgaŭ mi estos ilin tradukinta. — Estas neeble vivi sen mono. — Tio kaŭzis al mi grandajn malgajnojn, sed mi ne bedaŭras ĝin, ankoraŭ mi estas riĉa. — La urbanoj defendis la preĝejon dum tri tagoj.

## LECCION 23

*Tema 58.* Mi prezentas al vi la estontan edzinon de mia frato, tio estas, mian estontan bofratinon.— Multe honoras min la amikeco de tiu knabino.— Kiel vi fartas?— Mi estas malsaneta.— Mi ne fartas tre bone, ĉar la stomako doloras min kaj mi ne povas min nutri. — Kun tiu denta sufero mi ne povos maĉi. — Mia patro suferis kolikon kaj ankoraŭ fartas malbone. — Ĉu li estas febra? — Bedaŭrinde li havas tre altan febron, kaj tio multe maltrankviligas min.— Trankviligu vin; tio ne estas grava.— Ĉu vi venos morgaŭ? — Laŭ tio, se venos aŭ ne mia advokato kaj mia notario, ĉar mi bezonas paroli kun ili pri la heredontoj de miaj geonkloj. — Ĉu ili heredos multe da mono? — Monon ne, sed ili heredos la sofon kaj la komodon de la salono kaj la ŝrankon kaj la benkon, kiuj estis en la ĉambro de mia onklino. — De kio (aŭ pro kio) mortis via onklo?— Mia onklo multe suferis podagron, sed li mortis de (aŭ pro) ftizo. — Kio estis via onklo?— Li estis inĝeniero kaj estis konstruonta en la urbo grandan katedralon. — Ĉu vi vokis mian barbiron? — Jes, sinjoro, sed li ne povas veni, ĉar hieraŭ li malvarmumis kaj hodiaŭ li estas en la lito.— Mia patro venis kaj mi ankoraŭ estis lavonta min, sed feliĉe mi estis skribinta la leteron. — Sur la pantalono kaj veŝto de mia frato ankoraŭ mi estas kudronta la butonojn. — Vi multe laboras kaj neniam estas malsana; vi havas sanon de fero.

*Tema 59.* Diru al li, ke li estas bona.— Diru al li, ke li estu bona.— Pli bone estus se mi vidus vin, ĉar tiel ni parole traktus pri la proceso. — Homo amanta la vivon, ne fetas sin de la balkono.— Laŭ tio, ĉu vi kredas, ke li ne amas la vivon?— Kial ne? — Almenaŭ ni devas tion supozi.— Se mi estus manĝonta ĉiujn migdalojn kaj avelojn de mia ĝardeno, mi estus tremanta.— Miaj amikoj sin levis de la benko, sed mia flino ne volis levi sin. — Ĉu vi ŝatas la hispanan lingvon? — Jes, sinjoro. — Lernu ĝin.— Li venis ĝis tie ĉi naĝante. — Ĉu la najbarino havas mal-

multe da petrolo? — Hieraŭ ŝi aĉetis multe kaj mi supozas, ke ankoraŭ ŝi havas. — Arestonte la mortiginton, la poliestro eliris el mia domo. — Ĉu vi volas vin bani? — Dankon, mi ne scias naĝi. — Mi supozas, ke vi ne intencos surprizi min. — Ne, sinjoro; tiu supozo ofendas min. — Kial murmuras la aŭdantaro? — La aŭdantaro murmuras ĉar ŝi ne ŝatas tion, kion nun diras la parolanto, sed vi vidos kiel fine ĝi aplaŭdos lin.

*Tema 60.* Dum kvarono de horo li estis kun la kubuto sur la genuo, la vango sur la mano, legante malrapide la rekomendan leteron, kiun vi donis al mi por li. — Kaj kion li diris? — Li diris, ke la riproĉo estas maljusta, sed, ke li skribos al mia onklo aŭ al mia bofrato laŭ tio, se li morgaŭ ricevos aŭ ne sciigojn de Madrido. — Li ne estos skribonta la leteron ĝis kiam li ricevos la monon. — La homo parolonta en la teatro estas alta kaj blonda; mi esperas ke multaj aplaŭdos lin. — Laŭ letero, kiun mi ricevis hieraŭ, la prezo de la avelo estas tie tre alta. — Kion ili faras? — Ili estas plugantaj (aŭ plugante). — Kiam ili finos? — Mi ne scias, ĉar ili ankoraŭ estas plugantaj la ĝardenon. — Morgaŭ mi disdonos la broŝurojn kaj revuojn. — Ĉu vi donas al mi la libron? — Neeble; la infano ĝin disrompis kaj la vento disigis kaj dissemis la paperojn. — La venonta vintro ne estos tiel malvarma, kiel la nuna.

## LECCION 24

### Tema 61

Petro	amas sian kuzon,	sed ne sian fratiron,	ĉar lia fratino estas...
»	» »	» lian »	» » estas...
»	» »	» siajn fratinojn	» liaj fratinoj estas...
»	» »	» liajn »	» » estas...
»	» siajn kuzojn,	» ilian fratiron,	» ilia fratino estas...
»	» »	» iliajn fratinojn,	» iliaj fratinoj estas...
»	» sian kuzinon,	» ŝiajn fratojn,	» ŝiaj fratoj estas...
»	» siajn kuzinojn,	» ilian patrinon,	» ilia patrino estas...
»	vidas sian domon,	» ĝiajn balkonojn,	» ĝiaj balkonoj estas...
»	» siajn domojn,	» ilian ĝardenon,	» ilia ĝardeno estas...
Petrino	amas sian kuzon,	» sian fratiron,	» ŝia fratino estas...
»	» »	» siajn fratinojn,	» ŝiaj fratinoj estas...
»	vidas sian domon,	» ĝiajn balkonojn,	» ĝiaj balkonoj estas...
La doktoro kaj lia edzino	amas sian kuzon,	» siajn fratojn,	» iliaj fratoj estas...
»	» siajn kuzojn,	» sian fratiron,	» ilia fratino estas...
La lavistino kaj ŝia edzo	vidas sian kuzon,	» siajn onklojn,	» iliaj onkloj estas...
»	» siajn kuzojn,	» ilian patron,	» ilia patro estas...
»	» sian ĝardenon,	» ĝiajn arbojn,	» ĝiaj arboj estas...
»	» siajn ĝardenojn,	» iliajn arbojn,	» iliaj arboj estas...

## LECCION 25

*Tema 62.* Ĉu vi legis ion bonan en la lastaj sciigoj? — Oni diras, ke la reĝo kaj lia juna edzino vizitos tiun ĉi provincon, sed mi tion ne kredas ĉar la vetero nun estas malbonega kaj malseka. — Iu parolis kun mi pri tio, sed la sciigoj, kiujn ĝis nun ricevis la urbestro, estas tre malklaraj kaj estas tre kredoble, ke la reĝo venos tien ĉi sola. — Aliaj diras, ke la reĝoj tuj venos. — Helpante unu la alian (ĉ sin reciproke), miaj amikoj konstruos super la rivero grandan ponton, kiu beligos la valon; tiam, tra la ponto ni povos facile iri en la urbon. — Tuj kiam vi venos ni manĝos; ĉu vi volas, ke oni rostu viandon? — Ne, anstataŭ rosti ĝin mi preferas, ke oni ĝin fritu kaj poste, ke oni boligu akvon por la legomoj. — Ankaŭ ni manĝos fiŝojn; ni havas haringojn, sardinojn kaj salmojn. — La virino eniranta nun en la teatron estas mia gladistino, ĉu vi ŝin konas? — Mi ne, sed oni murmuras, ke ŝi ne estas tre virta kaj iu diris al mi, ke ŝi estas unu el tiuj, kiuj sin batis reciproke hieraŭ en la placo. — Kiel oni povis estingi tion? — Ni vokis la virojn, la virinojn, la infanojn; ĉiuj venis tuj tien ĉi por helpi al ni kaj tiel ni povis ĝin estingi. — Venu, Petro, venu tuj! rigardu kiel saltas en la akvon la ranoj, kiam ni promenas apud la lago. — Mi timas iri tien, ĉar hieraŭ mi vidis serpenton sub tiu granda arbo. — Oni certigas, ke tiu komercisto vendos ĉemizojn silkajn, lanajn kaj kotonajn kaj vestojn velurajn, nun kiam li estas heredonta multe da mono. — Ĉu li estos tiam la unua komercisto de la insularo? — Jes; alie li ĉiam estus tre malriĉa komercisto. — La elirinta virino vendis sian meblaron al miaj geonkloj; ĉiufoje kiam mi pasas antaŭ la kafejo, mi ŝin vidas. — Eniru tuj!

*Tema 63.* Foje kiam mi parolis kun li, ni pritraktis tiun aferon, sed apenaŭ mi povis ĝin klarigi, ĉar li tuj eniris en sian domon. — Ankaŭ mi ĉiam, kiam mi lin vidas, intencas paroli pri tio sed estas al mi neeble. La tempo tion klarigos. — Oni murmuras pri ŝia virto. — Ankaŭ mi aŭdis ion pri tio, sed mi ne



povas tion certigi. — Legu tiun leteron per kiu oni diras al mi, ke la helpinto de miaj fratoj mortis en la momento kiam alvenis sia patrino. — El kie ŝi venis? — Ŝi venis el Madrido. — Ĉu vi aŭdis? — Mi kredas, ke iu nin vokis. — Mi dormis (ó estis dormanta) kaj viaj krioj vekis min. — Ĉu vi vidis la novan provincon? — Ne, sinjoro; ankaŭ mi ne vidis lian familion; sed oni diris al mi, ke ĉiuj alvenis bone. — Hodiaŭ vi havas malbonan mienon, kio okazas al vi? — Mi ne bone fartas; la stomako doloras min. — Ĉu vi volas promeni kun mi? — Kun plezuro. — La vetero en tiu ĉi regiono estas belega, la tago estas hela kaj la suno varmigas malaperigante la malsekecon; ni promenos kaj poste ni iros en la teatron. — Kien vi deziras iri? — En la teatron kaj poste en la kafejon. — Mi akompanos vin kaj klarigos al vi la aventuron okazintan al mi hieraŭ.

## LECCION 26

*Tema 64.* Kion vi faris dum la pasinta somero? — Apenaŭ mi ricevis la monon, kiun mia patro sendis al mi, mi iris en Svisujon; tamen poste mi eliris el Svisujo por viziti miajn norvegajn amikojn. — Ĉu vi vidis viajn kuzojn kaj la miajn? — Ne, sinjoro; sed oni diras ke, malgraŭ ilia amikeco, ili batis sin reciproke hieraŭ. — Kien iris via fratino? — Kiam mi finis la leteron, ŝi eniris en sian ĉambron por lavi sin; ĉiutage ŝi lavas sin antaŭ ol sin vesti. — Kaj ĉu via patrino estas dome? — Antaŭ du horoj ŝi iris en la preĝejon; sed antaŭ ol veni domen, ŝi iros en la bazon por aĉeti inkujon kaj monujon por si. — Kie ŝi loĝas? — Ŝi loĝas la teretaĝon, ĉar estas al ŝi neeble loĝi la suprajn etaĝojn; ŝia malsano malpermesas al ŝi supreniri ŝtuparon. — Kion faris mia fratino, kiam mi eniris en la malgrandan saloneton? — Kiam mi eniris en la salono ŝi brodis, sed ŝi estis gladinta miajn kotonajn ĉemizojn.

*Tema 65.* Kie estas nia hundeto? — Ĝi estas en la ĝardeno, kuŝante sub figujo. — Tiu domo havas tre beletajn balkonojn sed la malsupraj estas pli beletaj ol la supraj. — Kontraŭ la palaco

de miaj gepatroj staras grandaj kaŝtanujoj. — Ĉu estoseble semi brasikojn aŭ asparagojn laŭlonge de la promenejo? — Kial ne? ne nur laŭlonge sed ankaŭ laŭlarĝe; ni neniam utiligas tiun promenejon. — Malgraŭ ke mi trifoje vokis la seruriston li ankoraŭ ne venis; ĉu vi faros al mi la plezuron veki lin kiam vi pasos antaŭ lia butikoj? — Kun plezuro, sed mi kredas ke li neniel povos veni; li havas multe da laboro en la magazenoj de mia bazaro. — La arkitekturisto diras, ke estas danĝere plialtigi la tegmenton de la domo; tamen estas necese fari tion por plialtigi ankaŭ la plafonojn de la etaĝoj. — Ŝiaj nigraj brovoj, ŝiaj blondaj okulharoj kaj ŝiaj bluj okuloj donas al ŝia mieno nepriskribeblan belecon. — Apenaŭ mi manĝis, mi konfesis al li tion kaj mia patro ĉion pardonis al mi. — Donaĉonte ion al mia fratino, mi eniris en la butikon por aĉeti arĝentan kombilon por ŝi. — Kiom da muŝoj!

*Tema 66.* Estas necese, ke ni aĉetu gladilojn kaj balailojn por la servistino. — La araneoj kaj la formikoj multe laboras. — Kiel fartas sinjoro via patro? — Li fartas bone; estas vere, ke li regalas sin multe kaj promenas ĉiutage. — Prenu tion. — Ne, neniel mi povas ĝin akcepti. — Destilinte la akvon, ni eklaboris kune. — Estas certe ke morgaŭ nia ĝardenisto falĉos la hordeon kaj poste erpos la ĝardenon. — La plej bona konsilanto kaj la plej bona amiko estas bona libro. — Kiu estas la kribrontoj? — Tiuj ĉi. — Ĉu vi havas bileton por eniri en la teatron? — Mi ĝin perdis, sed tamen mi iel eniros malgraŭ la pordistoj. — Kie estas via fianĉo? — Kontraŭ vi; li estas tiu, kiu staras meze de la salono parolante kun mia patro. — Ili ne estus estingintaj la fajron sen via helpo. — Ĉu vi venos kun mi? — Laŭ tio, se mia patro venos aŭ ne.

## LECCION 27

*Tema 67.* Hodiaŭ la vetero estas malbonega, ĉu vi kredas, ke pluvos? — Estas malfacile certigi tion, sed laŭ la sciigoj, kiujn ĵieraŭ publikigis la gazetoj, tiu ĉi semajno estos tre pluva; ĵieraŭ neĝis ĉie. — Estas neeble deĉifri tiun leteron; mia kuzo

skribas tro malbone por ke oni povu legi facile liajn leterojn. — Mi vidas ke vi trograndigas kaj malfaciligas ĉion; mi kuraĝas legi ĝin rapide. — Ĉiel, tio estas neebila por mi. — Kial liberigis la mortiginto? — La juĝisto ial liberigis lin. — Ĉu estas necese, ke ni kurbigu la metalfadenon? — Jes, ĉar kiam ĝi kurbigos ĝi eniros pli facile. — Ruĝiginte la feron, ni ekbatis ĝin per la granda martelo. — Ĉu vi vizitis hieraŭ la gemarkizojn? — Jes; li laŭdas sin multe, mi kredas ke lia nobeleco lin fierigas troe. — Ĉu vi sendis al li lian libron? — Mi ĝin sendis al li hodiaŭ. — Ĉu vi venas kun mi en la preĝejon? — Kun vi mi iras ĉien.

*Tema 68.* Ĉu vi instruos min, kiel oni devas kudri veston? Jes, sinjorino; sed nun mi ne havas fadenon, nek tondilon. — Vi havas sur la barbo kaj sur la lipoj inkajn makulojn; purigu vin. — Dankon. — Ĉu vi edziniĝos morgaŭ, fraŭlino? — Jes, sinjorino, morgaŭ. — La kafo estas tre varma, dum ĝi malvarmigas ni faros la gelatenon. — La nepineto tondis la lipharojn al sia avo kaj dume tiu ĉi gaje ridis. — Ĉu vi ŝatas la porkan viandon? — Treege. — Tiu teleraro konsistas el kvar pladoj, tri dekduoj da fajencaj teleroj kaj unu dekduo da porcelanaj tasoj; ankaŭ mi povas vendi al vi kaserolojn kaj ferajn kaldronojn. — La palaco konstruiĝis rapide. — Estus facile, ke li riĉiĝos kun via helpo. — Li ĉiel riĉiĝos. — Venu en la ĝardenon kaj vi vidos la ĉevalojn kaj la kokejon. — Tiu ĉi ĉevalo havas la kolharojn tro mallongajn. — Tie ĉi mi havas du kokojn, tri kokinojn, du meleagrojn kaj kvin meleagrinojn. — Kien kuris la kato? — La kato kuris sub la lignan tablon. — Ili publike insultis unu la alian. — Li ial paliĝis tuj kiam li sciis, kion ni estis pritraktantaj. — Ĉu estus facile fandi tiujn ĉi ferajn kulerojn? — Jes, sinjoro; la fero fandiĝas tre facile.

*Tema 69.* Kiam mi alvenis estis hajlinte kaj ni ne povis falĉi la avenon. — La lavistinedzo kripliĝis laborante en tiu fabriko. — Malgraŭ nia deziro, ni ne povos vaporigi tion. — Ĉu vi scias, ke venas tien ĉi regimento? — Jes, sinjoro, tiu novaĵo publikiĝis hieraŭ, sed oni diras, ke ĝi estas malvera. — Ĉu vi aŭdis hieraŭ nian profesoron en la Universitato? — Li elokventiĝis pritraktante tiel malagrablan aferon. — Mi, miaflanke, kre-

das ke ĉiuj aferoj estas agrablaj por la parolanto sed ne por la aŭskultantaro.

## LECCION 28

*Tema 70.* Denove ni venas paroli kun vi, ĉar kvankam li sin decidis helpi nin, ni bezonas koni la lokon, kie oni rekonstruos la fabrikon. — Tiun ĉi vesperon mi povos diri tion al vi, sed mi kredas, ke la loko estas tre proksima, meze de tiu densa arbaro. — Kien vi iros noktomanĝi? — Mi iros ĉe miajn gepatrojn. — Kioma horo estas? — Nun batas la dua. — La tria. — La tria kaj kvin minutoj (ó kvin minutoj de la kvara). — La kvina kaj kvarono (ó kvarono de la sesa). — La sepa kaj duono (ó la sepa kaj tridek minutoj, ó duono de la oka ó duono antaŭ la oka). — La oka kaj tri kvaronoj (ó tri kvaronoj de la naŭa ó kvarono antaŭ la naŭa). — Kvin minutoj antaŭ la naŭa. — Antaŭ ol ni matenmanĝos mi relegos la leteron, kiun mi ricevis hieraŭ. — Kion oni diras al vi per ĝi? — Oni sciigas min, ke anstataŭ veni nur mia frato, li venos kun mia fratino; trovinte nenie helpon, ili sin decidis veni tien ĉi. — Kiam mi forĝis tiujn ĉi pontojn? — Tiuj pontoj estis forĝataj hieraŭ matene, antaŭ ol veni mia patro.

*Tema 71.* Sur la dua paĝo de tiu kajero vi legos versojn de unu el la plej bonaj nuntempaj poetoj; li vere estas la princo de la hispana poezio. — La malagrabla sono de lia voĉo devigas min ne sidiĝi apud li. — Ĉu vi deziras, ke ŝi kantu? — Jes, ĉar ŝi kantas per tre bela voĉo; tamen estas bedaŭrinde, ke ĝi ne estu pli sona. — Kiam mortis nia amiko? — Li mortis venenate antaŭ du jaroj. — Divenu, kion ni faros tiun ĉi postagmezon. — Ni iros en la ĝardenon de mia onklo, kie ni manĝos ĉerizojn, daktilojn, fragojn kaj avelojn; krom tio, li promesis donaci al ni bombonojn. — Kiam, kontraŭ lia deziro, ni paroligas lin pri tiu afero li tremas kaj paliĝas. — Ĉu vi havas cigaredon? — Jes, mi havas. — Iam mi ĝin redonos al vi. — Havigu al mi bonan serviston.

*Tema 72.* Kiam oni frapas lignan tablon aŭ kristalan gla-

son, oni diras hispane, ke la tablo kaj la glaso *sonas*, sed esperante oni devas diri, ke la tablo *sonas* kaj la glaso *sonoras*.—Mi ne scias ludi la klarneton kaj tamen iam mi sonorigis ĝin. —La sonorigisto multe amas sian filinon, tial li ĉiumomente ŝin karesas kaj kisas. —Ĉu vi povas diri al mi la tagon, kiam venos via frato?—Ankoraŭ ne; tio estos decidata morgaŭ. —La liberigatoj ĝentile dankis min.—En mia ĝardeno mi kreskigas kardojn, karotojn kaj napojn.—Havigu al mi monon!—Vi ne devas labori tiom; tio estas senutile laciĝi. —Tiuĵ lampoj estos venditaĵ morgaŭ en la placo.—Jen estas kompatinda homo.—Ĉiutage mia najbaro tamburas, tial la kapo doloras min.—Tio estas facile farebla.

## LECCION 29

*Tema 73.* Kial vi revenis tiel frue hejmen? —Ĉar la vetero estis malbonega kaj la tondroj kaj fulmoj timigis mian edzinon, sed ekpluvis kiam ni estis suprenirante la ŝtuparon.—Kvankam la fromaĝo estis freŝa, ĝi ranciĝis pro la troa malsekeco de la kuirejo.—Ne forgesu la sekvantajn ekzemplojn, kiuj instruos vin traduki korekte esperanten la hispanan vorton *tocar* per ĝia responda en la helpa lingvo; kiam iu ludas la violonon, vi, ekzemple, diru esperante: «mia kuzo *ludas* tre arte la violonon»; se vi volas esprimi, ke la spongo, kiu kuŝas sur la tablo, tuŝas la apudestantan botelon, vi diros: «la spongo *tuŝas* la botelon»; kaj se per viaj manoj vi palpas la manikojn de via jakto por ekzameni la drapon, el kiu ĝi estas farita, vi devas diri: «mi *palpas* la manikojn de mia jakto».

*Tema 74.* Tiuĵ ĉi arboj malegale kreskis, sed ili tre baldaŭ egaligos.—La ŝtrumpoj de la saĝa knabino estas ornamitaj per verdaj rubandoj. — Miaj versoj estis korektitaj kaj kritikitaj, kiam eniris mia patro sekvate de miaj kuzoj. — Invitite de miaj geparencoj, mi garantiis la kontrakton per mia subskribo. —Kiam vi revenos el la kamparo, vi estos tute resanigita. —Tiu fermentilo ne estas bona, anstataŭu ĝin per alia. —Ĉiu herbejo,

Ĉiu ĝardeno, ĉiu legomejo estas ĉirkaŭita per arboj kaj rigardante de supre la turo ŝajnas kvazaŭ ĉiu parto estus limigita per verda rubando.—Trinku sentime, fluanta akvo neniun malsanigas.—Se vi irus ien mi plezure akompanus vin.— Dankon, ne estas necese.—Unuj tamburas, aliaj trumpetas; tiom da bruo surdigas min.

*Tema 75.* Ĉu estas malfrue? — Ne, ankoraŭ estas frue, sed la malsanuloj enlitiĝas.— La belulino sin kaŝis post la kurtenoj de sia fenestro, vidante en la kontraŭa balkono elegantan junulon (ó junan elegantulon). — Kiam li estis juna ĉiuj timis lin, ĉar li estis tre malbona, sed poste li korektiĝis. — Tiu sanigilo balda sanigos lian tuson. — Mia filo estas tre saĝa kaj laboros por triumfiĝi nian ideon; certe ni ĝojos esti helpataj de li.— Kiam likvidis tiu societo? — Ĝi likvidis antaŭ tri tagoj.— Ĉu vi ŝatas la ŝafviandon? — Ne, sinjoro, mi preferas tiun de porkon. — Kion vi havas en la poŝo?—Mi havas en la poŝo du abriko-tojn. — La vunditoj baldaŭ sanigĝos.

### LECCION 30

*Tema 76.* Kial ne ludas jam la infanoj? — Ili ne ludas, ĉar ili forĵetis la pilkon sur la straton. — La ĉielo sennubiĝis; ni povas, do, foriri. — Forkurante, la malamiko estis devigata forlasi la paflegojn. — Tiu komedio estas ĉie aplaŭdata. — Jam ne estas necese, ke vi prenu la taseton.—Ŝi estas ĉiel feliĉa; tamen, forlasita de siaj amikinoj, ŝi baldaŭ estos malbonhumora.—Nenio estas al mi tiel agrabla, kiel tio. — La ĉasisto pafis kaj la korvaro forflugis super la plej altajn montojn.—En tiu apoteko vi trovos bonajn kaj malkarajn sanigilojn. — La ĥemio kaj la farmacio estas du frataj sciencoj. — Nenio estas aĉetinda en tiu bazaro. — Li brosis sin antaŭ ol foriri. — Estas malpermesate fumi interne de la teatroj. — Ili stariĝis kaj trinkis pokalon da ĉampano por la bonfarto de la gereĝoj.

*Tema 77.* Mia amiko Petro, kiu estas bona pafisto, vundis la tigron meze de la koro.—La kranio estas kvazaŭ osta ĉambro

loĝata de la cerbo.—Neniel vi forgesu miajn konsilojn, kiam vi estos for de tie ĉi. — Sendube ĉiuj gazetoj estas legeblaj, sed ne ĉiuj estas legindaj.—La libro estas jam bindata, morgaŭ mate-  
ne ĝin alportos la bindisto. — La tempo kaj la malsanoj al ni forprenas la karulojn. — Tio estas severe puninda, kvankam ĝi estas farita senintence. — Oni enŝlosis la kulpigaton kaj post (ó iom poste) malmulte (da tempo) aŭdiĝis pafó; kiam ni eniris la malfeliulo estis jam mortanta.

*Tema 78.* Ĉar via nevino ne estas plenaĝa, ŝi ne povas ankoraŭ edziniĝi. — La urbestro pagis la ĉerkon por enterigi la almozulon, kiu mortigis hieraŭ.—Miaj gefiloj estas edukitaj en la plej bonaj lernejoj de la urbo.—Tuj kiam vi alvenis, mi estis vokata de miaj kunlernantoj. — Kiam mi ricevis la libron, mi estis jam ekzamenita, tial mi ĝin resendis. — Nenion dirante, ŝi akompanis min ĝis la preĝejo.—Kiomaĝa estas via nepo? (ó kiu estas la aĝo de via nepo?) — Mia nepeto havas kvar jarojn (ó estas kvarjara). — La vento renversis multajn arbojn de nia ĝardeno, malgraŭ la muroj, kiuj ĝin ĉirkaŭas. — Li estas mia savinto, kaj mi nomas lin tiel, ĉar foje, kiam mi falis en la maron, li kuraĝe jet's sin por min savi; ĉiuj homoj ne estas kapablaj fari tion.—Demetu vian ĉapon.—Mi iras dekstren, kaj vi? — Mi maldekstren. — La servistino malplenigis la kruĉojn.

## LECCION 31

*Tema 79.* La profesoro daŭrigis klarigante la lecionon al la ekzamenotoj, kondiĉe ke ili tre studos. — Senĉese parolante ni vidis neniun el niaj konatuloj.—La neĝa vetero ankoraŭ daŭros iom da tempo. — Mi ne ricevis la legotan libron, tial mi ne povas paroli pri ĝiaj meritoj. — Kion vi portas en la poŝoj?—En la dekstra poŝo mi portas du pomojn kaj en la maldekstra la ŝlosilojn de mia ŝranko.—Ili tre laŭdas sin. — Kiam ni legis la verkon, ankoraŭ ĝi estis aprobota. — Ŝiaj vangoj kolorigis, kiam la skribisto eklegis sian leteron.—Se ŝi ne estus farinta la malbonon, ŝi ne estus punota.—La fabrikisto ĉesigis la laboron

por festi la bapton de sia filo.—Kiuj estis la gebaptopatroj?— La gekuzoj de la fabrikisto.

*Tema 80.* Ĉu vi venos morgaŭ?—Mi venos kun la kondiĉo, ke vi atendos min. — La palaco estas konstruota de la plej bona hispana arĥitekturisto.—Mia forgesema amiko haltis kaj silentiĝis, atendante mian respondon.— Kiom da mono oni bezonas por transporti tiujn du kofretojn?—La transporto de tiuj du kofretoj estas senpaga.—La urbo, kiu estis atakota de reĝo Henriko, pretiĝis sin por heroo sindefendo. —Mi timas ke, kiam la sperta poliestro venos, la krimulo ankoraŭ estos arestota.—Ĉu vi elektos tiujn ĉi seĝojn?—Mi ne elektos tiujn ĉi, sed tiujn, kondiĉe ke vi atendos ĝis morgaŭ posttagmeze.— La libro verkota de mia patro, elmontros novajn ideojn pri la malsanoj de la gorgo, pulmo kaj hepato.—Ĉu vi verkos la daŭrigon?—Ne, sinjoro; mi kredas, mialflanke, ke la verko ne estas daŭrigota.

*Tema 81.* Ĉu viaj lernantoj scias deklinacii germane? — Ne ĉiuj, ĉar ĉiuj ne estas studemaj.— Pardonu min, sed mi povas fari nenion en tiu ĉi afero. — Vi ne atingos ĉion, kion vi deziras.—Ĉu ni estus kopiintaj la lecionon, se ni estus havintaj paperon? — Kvankam ni estus havintaj paperon, ni ne estus kopiintaj la lecionon, ĉar ni ne havas inkon, nek krajonon. — Sendube, kiam vi revenos, la ponto ankoraŭ estos konstruota. — Kiam ĉesis la bruo, la virinoj daŭrigis la preĝon. — La amitino neniam forgesas la feliĉajn tagojn tiel gaje pasigitajn.— Nur estas malpermesate transigi gravajn sciigojn. — Mi esperas ke la mara aero baldaŭ resanigos min. — Kie estas la birdetoj?—Trans la rivero.—Kien flugas la birdetoj? — Trans la riveron. — Policano A. proklamis la senkulpecon de la arestoto. — La sperta policano A. denunciis la sovaĝajn aŭtorojn. — Kion vi faras? — Mi transformas la ĝardenon. — Estas malfacile konverti tiun viron.

## LECCION 32

*Tema 82.* Kial vi ne kudras, fraŭlino?—Ĉar nevole mi ĵetis sur la straton mian arĝentan fingringon. — Ĉu vi povos kudri



per la mia?—Jes, sinjorino, mi kudras per iu ajn.—Reĝo Alfonso dektria kroniĝis en la jaro mil naŭcent du.—Kiu ajn li estis, li devis transigi tuj la sciigon.—Tial ke vi malgrasiĝas ni ĉesigos la laborojn ĝis la venonta monato. —Kia bela vinbero! —Kion vi celas apartigante tiujn acidojn? —Vi eraras ĉar, mi apartigas nenion, male, mi ilin miksas. —Ĉu vi memoras la daton de mia lasta letero? —Jes, sinjoro, ĝi estis la dekkvina de Marto. —Kiom da objektoj kuŝas sur la tablo! —Kiuj venis hieraŭ? —Hieraŭ venis niaj anglaj amikoj; ili parolis kun miaj gepatroj kaj funkciigis la novajn premilojn.—Kiajn ĉevalinojn vi deziras aĉeti? ĉu germanajn aŭ anglajn? —Anglajn. —De tiam mi ne vidis lin.

*Tema 83.* Mi ricevis tri barelojn da kalko, pri kies prezo mi deziras paroli kun vi.—Kiom vi pagos por ili?—Vi diros. —Ĉu vi volas pagi ilin po tri pesetoj?—Pleje mi ilin pagos po dek realoj.—Mi forlasis mian plumingon ĉe mi.—La militistoj gratulos la elpensinton, kie ajn ili vidos lin. —Kien ajn mi iras, mi trovas karajn amikojn.—Po kiom kostis la tri numeroj de la gazeto? —Po unu peseto kaj kvindek centimoj. —Kiam ajn li venos, mi ĝentile akceptos lin.—Miaj fratinoj iros en la monaĥejon; de hieraŭ ilin atendas la monaĥoj. —La dikaj muroj de la templo bruege falis. —Kiajn cigaringojn vi deziras? ĉu lignajn? —Ne, sinjoro, mi deziras aĉeti oran cigaringon. —Kie vi loĝas?—Mi loĝas en la tria etaĝo de la numero dudek-unua de tiu ĉi strato.—Tiuj pokaloj de ĉampano estas tre karaj.—Ĉu vi volas trinki glaseton da brando?

*Tema 84.* De kiam mi venis, ankoraŭ mi ne povis skribi al miaj gepatroj.—Mi ankaŭ ne.—La bovinoj, kiujn hieraŭ aĉetis mia boonklo estas de ni melkotaj. —La bonanima monaĥino dorlotis la malsanulojn. —Ni miris rigardante la belajn fenestrojn de la templo. —Ŝi verŝis la acidon sur lian vizagon. —Ŝi verŝis la acidon sur sian vizagon.—Tiu ĉi barelo kostos tri frankojn. —La servistino ŝutis la teron suprenirante la ŝtuparon.—La kuraĝa reĝo eningigis la glavon kaj ĉirkaŭpremis la malamikon.—Ŝi ĉiutage vizitas siajn multenombrajn geamikojn, —Se vi meditus pri la celo de mia peto, la afero klariĝus.

Estu cedema! — La ekzekutoto meditis kaj ploris; ĝis la lasta momento li esperis atingi la pardonon.—Ili flatas sin reciproke (ó unu la alian).—Li ĉiam estas preta oferi sin por ili.—Dum la esploristoj antaŭeniris, la gvidisto observis la vojon. — De tri tagoj la malsanulo malmulte dormas, — Oni malsekigis liajn tempiojn per vinagro. — De kiam oni admonis lin, li ĉiutage lernas la lecionon.

### LECCION 33

*Tema 85.* Verŝante la fluidaĵon en la botelon, li mem tremis de timo.—Dum ni parolis al li, li verŝis la vinon el la botelo.—Hodiaŭ mem mi parolos kun iaj samideanoj. — La komponicio estis notkantata antaŭ niaj fervoraj estroj.—La ĵaluzulino eliris el la urbo kaj tie ĉi mem, kie ni nun estas, ŝi memmortigis sin.—Odorantaj floroj ornamis la tablon, ĉirkaŭ kiu sidis la bateriestroj.—Kiuj knaboj venis? — Neniu knabo venis, sed iuj el niaj samurbanoj venis serĉante kokinojn samspecajn ol tiuj, kiujn ni havis antaŭhieraŭ. — Ĉu vi volas aĉeti skulptaĵon aŭ fotografaĵon?—Estas same.—Kiel ŝajnas al vi tiu fotografaĵo?—Ĝi estas tre bone farita, ĝi estas vi mem!—La du knabinoj, kiuj estis en la salono estas same belaj. — Ni mem faros tion, se vi ĝin ne malpermesas.—For de tie ĉi, kanajlo!

*Tema 86.* Ĉu vi venos morgaŭ por tagmanĝi kun ni? — Mi ne povas certigi, ĉu mi venos aŭ ne.—Laŭ tio se mi havos aŭ ne tempon liberan por tio.—Mi dezirus scii, ĉu ili ricevis la monon, kiun mi ŝuldis al ili. — Li venis neatendite por glori niajn herogaĵojn. — La nordokcidenta vento ĉesos, kondiĉe ke hodiaŭ pluvos.—La libro, kiun verkas la episkopo, estas nereligia.—Sciante, ke oni konsideras lin kiel gloran poeton, li laŭdas sin mem. —En mia notlibro mi notis la prezojn de la aĉetotaj objektoj. — Tio estas kiel unutaga floro, kiu baldaŭ velkas.—La unuatagaj floroj estis pli beleĵaj, ol la hodiaŭaj.—Mi dubas, ĉu la suda vento daŭros ĝis la dimanĉo. — Selonte la ĉevalon, li petis de mi arĝentajn piedingojn. — Ni ne scias, ĉu la eskadronestro volos aĉeti la kaleŝon.

*Tema 87.* La malsanulo ofte sputis sangon.—En mia malvasta ĉambro ĉiutage kunvenas miaj multenombraj amikoj, tial estas necese, ĝin ventoli ofte. — La kruĉo, kiun hieraŭ aĉetis miaj kuzoj, estas el flava kupro, sed tiu, kiun ni aĉetos morgaŭ estos kupra.—Ĉu vi ŝatas la muzikon?—Mi ĝin ŝatas.—La promenantoj haltis antaŭ la vasta ebenaĵo por ripozi dum mallongaj momentoj.—La meritoj de la verko, kiun mia patro ricevis, estas netakseblaj. —Malfaldu la drapon! — La brigadestro estis tre kruela por siaj subuloj. — Ĉu vi gustumis tiun ĉi fromaĝon? — Ne, sinjoro; mi multe ŝatas la fromaĝon, sed mi ne scias, ĉu tiu ĉi plaĉos al mi.—Vi mem stanos la kaserolon.—Sendube la kruĉo rompiĝis, ĉar ĝi senĉese elgutas. — En Esperanto oni konas la virinseksajn nomojn per la finiĝo *ino*.—Li multe moderiĝis post la morto de sia edzino.—La dukino kantis arion tre beletan, kiu estis aplaŭdata de la aŭdantaro.—Mia najbarino flaris la florojn, kiujn ŝi estis portinta sur sia brusto.—Premiite li ricevis multajn gratulojn.

## LECCION 34

*Tema 88.* Anstataŭ iri Parizon ni pasigos la someron ĉe la marbordo. — Tiu pano ne estas freŝa, ĝi estas bakita de hieraŭ.—Domaĝe, ke la literoj estas tiel malgrandaj. — Ironte promeni kun la principino, li ordonis, ke oni glatigu la promenejon.—Ni mem kuiras morgaŭ; ni aĉetos du kuniklidojn por la tagmanĝo kaj unu kokidon por la vespermanĝo.—La birdetoj flugis de branĉo al branĉo. — La leĝo publikigata dum la pasinta jaro ordonas, ke oni pagu en la urbestrejo.—Se eĉ ni scius ĝin, ni ne povus diri ĝin al vi.—Ĉu ili akompanos la kuiristinon ĝis la palaco?—Jes, sinjoro, kaj eĉ ĝis la fonto. —La maljunuloj, la virinoj kaj eĉ la infanoj estis vunditaj. — Mi ne iros ĝis Parizo.

*Tema 89.* Eĉ ĉe mi li min insultas. — Ĝis mia domo akompanis min la amikoj ordenitaj de la batalionestro.—Estas domaĝo, ke domo tiel bela cindriĝis.—Por memmortigi sin, li ĵetis sin al la fundo.—La tabloj estis malordigitaj (ĉ la tabloj estis en

malordo, ó la tabloj estis sen ordo).—La knabinoj ne povas legi ĉiajn librojn, ĉar ĉiaj libroj ne estas honestaj.—Estas neeble, ke homo legu ĉiujn librojn publikigatajn.—Ĉia floro havas malsaman parfumon.—Pasis du monatoj antaŭ ol li venis komuniki al mi sian edziĝon.—La generalo kaj lia edzino pasigis la nokton pensante pri sia filo.—Kiajn revuojn vi deziras?—Mi deziras ĉiajn revuojn.—Ĉiuj ne pensas la samon pri tiu malglata afero, sed ĉiu pia homo pardonos la kulpigiton.

*Tema 90.* Ĉu vi havas la bonecon montri al mi la plej rektan vojon por iri al preĝejo A.?—Iru laŭ tiu strato kaj alvenante en grandan placon, iru dekstren.—La preĝejo plaĉos al vi; ĝi estas belegaĵo.—El tio naskiĝos multaj malĝojoj.—Tio naskos multajn malĝojojn.—Ankoraŭ estis naskota mia frato, kiam ni venis el Madrido.—Mia kuzo Antono naskiĝis antaŭ dudek jaroj.—Tiu afero nenion produktas al mi.—La laŭ plena senco de la vorto.—Ŝi fanfaronas esti bela kaj eĉ eleganta.—Figuru al vi, ke la falsisto estis li mem.—Li distriĝas (ó li distras sin) legante libron, kiu priskribas la vivon en la dezerto.—La radikoj de iaj kreskaĵoj estas resanigaj.

## LECCION 35

*Tema 91.* Ni promenis kune ĝis la rivero, sed li pasis transen ĉar en la transa bordo staras lia domo.—Distritaj de la disputo, ni preterpasis la pordon de nia ĉambro.—La perdrikoj estas transflugantaj birdoj.—Ni parolis pri la veturilo, kiun mia patro hieraŭ aĉetis.—La memoro pri tiu simio ĝojigas min.—Por pruvi sian lertecon, li faris tiun gravuraĵon per la maldekstra mano.—La infanino mortigis la papilion per mia bastono.—El kie ili venas?—Ili venas el Madrido.—Nia kutimo estas pasi tra la strato A. por iri en la teatron.—Ŝia veturilo kaj la mia estas tre similaj.—Ĉiu paĝo konsistas el trimil kvarcent kvindek sep vortoj.—Ordinare, mi dormas sur du litkusenoj.—Ju malpli bona estas ia infanino, des malpli ŝin amas ŝiaj gepatroj.—La generalo estis gratulata de ĉiuj.—La amo de patrino

— La amo de Dio.—La amo al (ó por) Dio.—Ni vespermanĝos la alaŭdojn, kiujn ni mortigis. — La fianĉo de mia fratino estas doktoro de farmacio; li baldaŭ malfermos apotekon en tiu strato mem.—Li mortis dudek-jara (ó havante dudek jarojn).

*Tema 92.* La proksiman lundon mi veturos Parizon.— Madrido, en la 5<sup>a</sup> (ó la 5.<sup>an</sup>) de Aŭgusto de 1906<sup>a</sup> (jaro).— Flanken de la reĝo sin metis le geprincidoj. — Mi respondoj je via letero (ó vian leteron) tuj, kjam mi povos. — Estas domaĝo, ke oni ne helpas al li (ó lin). — Ili plenigis la botelojn je vino. — Li ruĝigis je (ó pro honto) aŭdante miajn vortojn. — La profesoro de lingvo internacia venis tien ĉi hieraŭ. — Tiam mi estis studento de leĝoscienco.—Miaj kuzoj estos komercistoj de ŝtofoj aŭ fabrikistoj de inko. — Mia amiko estis profesoro de desegnarto. — La arto danci estas malfacila por iuj. — Des pli malbone (ó tiom pli malbone) se vi mortigos iujn fazanojn!— La ursoj atakis la vilaĝon kaj poste ili sin kaŝis en la arbaron.— Mi neniam vidis kamelojn nek elefantojn.—Ni feliĉe marveturis.

## LECCION 36

*Tema 93.* Ĉu vi scias ion bonan? — Mi nenion bonan scias. — Ĉu okazas io nova?—Nenio nova okazas. — Ĉu vi fartas bone? — Ne tre bone; mi deziras paroli kun la kuracisto, ĉar mi havas ion en la laringo, kio malpermesas al mi engluti.—Ankaŭ min doloras la dorso, sed tio ne estas grava. — Kion ajn vi faros la doloro ne malaperos. — Ĉu tio ĉi estas tiel bela kiel tio? — Tio estas la plej bela.—Ĉio tio plaĉas al mi.—Ĉu vi legis ĉion?—Ĉion. — Kio plej plaĉas al vi? — Kion vi legas? — Mi legas en tiu ĉi gazeto ion novan pri la amasigiloj — Ĉu vi faris la enfendaĵojn per la poŝtranĉilo? — Ne, sinjorino, mi faris ilin per malnova glavo.—Ĉu iu venis?—Neniu venis. — Ĉu vi vidis iun? — Neniun mi vidis.—Kiu venis? — Ĉiuj niaj amikoj kaj tiuj de mia onklo. — Cetere, se tiu ĉi libro ne plaĉas al vi, vi povas elekti alian ajn. — Vi estas prava. — Kiun vi vokis? — Mi vokis tiun ĉi, sed ne tiun.

*Tema 94.* Ĉiu venis kun sia libro.—Tiu ĉi plumoj estas pli bonaj, ol tiuj.—La regularo malpermesas al ni diskuti religiajn aferojn.—Nun neniu fumas.—Nun neniam homo fumas.—La amiko diris al mi, ke la vojoj estis barataj.—Tiam mi volis vidi iajn amikojn.—Mi aĉetis du dekduojn da kudriloj kaj kvar da pingloj.—Vi mem donis al mi la ringon.—Kiujn vestojn vi volas? Ĉu la novajn aŭ la malnovajn?—La novajn.—Kiuj libroj alvenis? Ĉu la grandaj aŭ la malgrandaj?—La malgrandaj.—Tia libro ne devis esti legata.—Mi severe punis tiajn homojn.—Ĉu vi legas ĉiajn librojn?—Mi legas ĉiujn librojn.—La rado de lia veturilo pasis sur la lumbo de la malfeliĉa besto.—Ni ne povas ĉasi, ĉar nia pulvo malsekiĝis.

*Tema 95.* Tiu ĉi tablo estas ies, sed la seĝoj estas ĉies.—Ĉu vi scias, kies estas tiu ĉapelo?—Tial ke mi ne memoras, kies estas tiu ĉapelo, mi ne povas diri, ke ĝi estas ties.—Ĉu tiu ĉi cigaringo estas via?—Mi kredas, ke ĝi estas nenies.—La ĉiesa tablo.—La iesa ĉapelo falis sur la straton.—Li nudigis sin antaŭ ol kuŝiĝi.—La turo, kies fenestrojn ni vidas, estas alta je dektri metroj (ĝ estas alta dektri metrojn).—La libro, kies aŭtoro estas nekonata, kostas tri pesetojn kaj duonon.—Kiam venos via frato?—Li venos en la venonta dimanĉo (ĝ la venontan dimanĉon).—Viaj vortoj pravigas min.

### LECCION 37

*Tema 96.* Mi volas iom el ĉio.—Kiom da mono vi havas?—Neniom.—Ĉu vi havas tiom, kiom mi?—Mi havas pli, ol vi.—Ĉiom mi havas.—Ial vi diris tion.—Neniam.—Kial vi venis tiel frue?—Ĉar mi havis nenion farotan.—La tiamaj homoj estis pli gentilaj.—Kiom horo estas?—Dudek minutoj antaŭ la kvara (ĝ kvardek minutoj de la kvara, ĝ la tria kaj kvardek minutoj).—La ĉitieaj virinoj estas pli belaj.—Neniam mi povos ĝin fari; tamen mi ĝin intencos.—Ĉiel mi finos tre baldaŭ la libron.—Ŝi neniam diris al mi tion.—Ie mi vidis mian naztukon.—Ĉu vi ien iras?—Neniam.—Kien vi iras?—Mi iras tien.—Mi iras Pari-

tria  
- tria  
+ dua

zon.—Mi iras Madridon.—Kiel finiĝos la komedio?—Tial ke mi jam ne estas malsana, nun mi iras ĉien.—Kiel bela ŝi estas!

*Tema 97.* Ĉu vi legis tion, kion hodiaŭ publikigas nia gazeto?— Ne, sinjoro, sed ĉion, kion publikigas nia gazeto, plaĉas al mi.—Ĉu vi komprenas ĉion, kion mi diras? — Mi komprenas iom el tio, kion vi diras.—Ĉu vi konas tiun, kiu venas?—Ne, sed mi konas ĉiujn, kiuj venos morgaŭ.— Ĉu vi parolos kun mi pri ĉio, kion vi vidis? — Mi parolos kun vi pri ĉio, kion mi vidis.— Mi parolis kun tiu, al kiu ni sendis la leteron. —Ĉiu, kiu venas, ne estas amiko mia. — Mi batos ĉiujn, kiuj eniros. — Ĉu eniris ĉiuj, kiujn ni vidis hieraŭ?—Jes, sinjoro, ĉiuj, kiujn ni vidis hieraŭ, eniris. — Ĉu estas aprobita ĉio, kio estis aplaŭdata? — Jes, sinjoro, sed mi ne aplaŭdas ĉion, kion vi aprobis.

## LECCIÓN 38

*Tema 98.* El timo malvarmumi, li butonumis sian jakon. —Kelkaj eniris en la monŝanĝejon kaj la ceteraj promeniĝis siajn ĝeinfanojn ĝis la sanktejo kaj poste vizitis la urbajn templojn, sed ne la katedralon, ĉar ĝi estis fermita. — Jezuo mem estis krucumita. — Mi forĝesis aĉeti manumojn kaj kolumojn por miaj blankaj ĉemizoj, kaj forkojn kaj buŝtukojn por mia patrino. —Kuŝiĝinte sur la planko, liekdormis. —Tiu ĉion manĝas, kiu malsatas. —Ĉu vi konas kelkajn kolegojn (ó kelke da kolegoj)?—Mi konas kelkajn.— La birdoj forflugis el la korto. — De unu semajno mi ĝin ripetis al li almenaŭ tri fojojn.—Tio ja estas vero.— Kian akvon vi preferas? ĉu tiun de puto aŭ tiun de cisterno? — Mi preferas tiun de puto; laŭ mia kuracisto, ĝi estas pli trinkebla. — Tiu manĝu, kiu malsatas kaj tiu, kiu soifas, trinku.—Ŝi ne diros ĝin al vi.—Ĉu pluvas aŭ neĝas?—Nek pluvigas, nek neĝas, sed estas nebule (ó nebulo, ó estas nebula vetero).—Ĉu estas varme (ó estas varma vetero)? —Estas malvarme (ó estas malvarma vetero).

*Tema 99.* Ĉu vi tenas ies ombrelon? — Ne, sinjoro, sed mia sunombrelo estas sur la tablo. — Decas, ke vi respondu ĝentile

leteron tiel signifan. — Ĝis profunda nokto ne finis mia fratino sian taskon. — Ili ne dece parolis. — Alia afero estus, se vi estus plenuminta vian promeson. — En tiu sama momento, kiam vi eniris, ni parolis pri tio. — Demetu vian ĉapelon, mi petas. — En efektiveco, vi ne povas certigi ĝin. — Kion vi tenis en la mano? — Mi tenis la ventumilon de mia fratino kaj la sunombreton de mia boonklino. — Parolu pli mallaŭte! — Ĉu vi daŭrigos la klarigon hodiaŭ vespere (ó tiun ĉi vesperon)? — Ne, sinjoro, mi ĝin daŭrigos morgaŭ matene. — Sur kiun tagon falos la festo? — La festo falos sur marŝon.

Id

### LECCION 39

*Tema 100.* Ĉu vi ĝojas, ke pluvas? — Mi ĝojas, ke pluvas, sed ne, ke hajlas; la akvo estas bona por la kamparo en tiu ĉi sezono, sed la hajlo neniam. — Mia patro donacis la ĉevalon antaŭ ol mi foriris. — Trovinte truon, la vermo forrampis. — La vendistino ĵetis al mi pezilon, kiu falis sur mian dekstran piedon. — Ĉu la pakaĵo multe pezos? — Malgraŭ, ke la pakaĵo multe pezos, li ĝin levos. — Kion ŝi neas? — Ŝi neas, ke vi aĉetis al ŝi la pesilon. — Malgraŭ, ke li estis vundita, li forrampis. — Kion vi deziras? — Pesu por mi du kilogramojn da pomoj. — Ĉu la pluvo daŭras? — La pluvo daŭros la tutan nokton (ó dum la tuta nokto), sed ĉesos morgaŭ matene. — La vetero estas malbona; estas marvarme. — Ĉu vi havas tempon por skribi? — Mi ne havas tempon. — Mi estas certa, ke mia amiko ludas la pianon (ó mi estas certa pri tio, ke li ludas la pianon). — Ni voku lin, por ke li legu al ni unu el siaj versaĵoj. — Submetu paperon, por ke la inkujo ne tuŝu la tablon. — Palpu ĝin, por ke vi konvinkigu, ke ĝi estas jam glatigita. — Paŝo post paŝo, ni atingos nian celon. — Ne plendu!

*Tema 101.* Pro kio (ó de kio) mortis nia najbaro? — Nia najbaro mortis subite. — Ilia subita foriro mirigis nin, ĉar ili foriris antaŭ ol alvenis la kuracisto. — La konstruota fervojo trapasos nian kampon. — Je kioma horo vi venos? — Mi venos je la naŭa vespere (ó la naŭan vespere). — Li estis ĵus vidinta sian fraton,



kiam ni haltigis lin; tiam li prezentis nin al siaj ĵusalvenintaj amikoj. — Kion vi serĉas? — Mi serĉas mian pajlan ĉapelon (ó mian ĉapelon el pajlo). — Kiam vi ĝin aĉetis? — Mi ĵus aĉetis ĝin. — Ĉu vi forgesos la tagojn de via kaptiteco? — Neeble; la kaptitecaj tagoj estas neforgeseblaj. — Kiel vi ĉasas la leonojn? — Ni ĉasas la leonojn per kaptilo. — Kiam rompiĝis miaj okulvitroj? — Hodiaŭ posttagmeze (ó tiun ĉi posttagmezon). — La profesoro admonis siajn lernantojn pli ol du fojojn (ó dufoje). — Ĉu vi estas varma aŭ malvarma? — Mi estas malvarma. — Mia patro publike lin admonis, por ke li hontigu. — Kiam finiĝos tiu ĉi laboro? — La kurantan monaton. — Mi hontas, ke mi faris tion (ó mi hontas pro tio, ke mi faris tion).

## LECCION 40

*Tema 102.* Ĉu mi povas paroli kun la mastro de la restoracio? — Nun li ne estas tie ĉi, sed tuj kiam li venos, li parolos kun vi. — Surmetu la ĉapelon (ó vian ĉapelon), mi petas. — Ĉu vi ludos kun mi je la domeno, aŭ je la damoj? — Dum vi ludas kun mia filo je la pilko, mi ludos je la ŝako kun Joĉjo. — Ludante, ni forĵetis la pilkon trans la ĝardenan muron, sed ŝia hundo ĝin alportis al ni kaj denove ni ekludis. — Li trompiĝis, ĉar li kredis ke tio, kio estis en la pakajo, estas pasteĉo. — Fidu al mi; mi estas nekapabla trompi iun. — Ĉu mi povas, do, diri al li, ke vi prenas tion sur vi? — Jes; mi promesas fari la eblon (ó fari ĉion eblan) por lin savi. — Mi ricevis vian poŝtkarton de la 4.<sup>a</sup> de la kuranta Junio; mi ne havas liberan tempon por longe (ó vaste) respondi la demandojn, kiujn vi faras al mi, nur mi diras ke vi povas kalkuli sur min por feliĉe fini la aferon. — Salute je mia nomo vian distingindan familion kaj akceptu fortan ĉirkaŭpremon de via plej bona amiko.

*Tema 103.* Hieraŭ oni mendis al mi centon da vizitkartoj, sed mi ne povos ilin sendi ĝis hodiaŭ vespere (ó ĝis la vespero, ó ĝis tiu ĉi vespero). — Se eĉ mi havus pli multe da laboristoj, mi ne povus ilin fini pli baldaŭ. — Se li ne ludus li atentus miajn konsilojn. — Kion vi eltiras el la ŝranka tirkesto? — Mi eltiras

skatolon, kiu enfermas la juvelojn, kiujn mi heredis de mia mortinta patrino. — Kiam ni estis enirintaj la preĝejon, la monaĥinoj ekpreĝis mallaŭte en la ĥorejo. — Ĉiuj gaje manĝis kaj antaŭ ol trinki la ĉampanon, la invititoj ĥore kantis. — Streĉu ŝnuron de muro al muro.—Ĉu vi vizitis iam mian kuzon?—Neniam, sed de nun mi iros viziti lin de tempo al tempo. — Mi lin vizitas unu fojon en la semajno (ó mi lin vizitas ĉiusemajne).—Mi ofte lin vizitas.—Ĉu vi apartenas al tiu ĉi Societo?—Ne; mi ekŝiĝis antaŭ du jaroj.

*Tema 104.* Se vi ne estus tiom kriinta, vi ne estus altirinta la atenton.—La korpoj kuntiriĝas pro la malvarmo.—La varmo plivastigas la korpojn. — En tiun ĉi keston ni metos la librojn sendotajn de ni al nia kasisto. — Kiom da mono ni havas en kaso? — En kaso ni havas tridek pesetojn. — Kiam mi vidis, ke la kordono tuj rompiĝos, mi malstreĉis ĝin.—Pro mia farto, la kuracistoj malpermesas al mi fasti; en tiu kaj en aliaj aferoj mi ne povas fari, kion mi volas. — Mi tion multe bedaŭras. — Mi venos pasigi kun vi la Antaŭkristnaskan Vesperon kaj mi alportos al vi kristnaskajn tortojn. — Mi turnis min al li, kaj diris la jenon: kial vi tiel parolas, se vi ne eksciis pri tio, kio okazas? — Pro ĝojo, ŝi turnis la leteron, ne povante ĝin eklegi. — La eksurbestro aĉetis dekduon da kukoj por siaj geinfanoj; al Joĉjo kaj Erneĉjo li donis po du kukoj, kaj disdonis la ceterajn al Klanjo kaj Mario. — La tradukado de tiu ĉi verko igos min labori dum longa tempo.—Ĉu vi legis la esperantan tradukon de *Julio Cezaro*, el Ŝekspiro? — Mi ne povis ankoraŭ ĝin legi, ĉar mi ne ricevis tiun tragedion. — Ŝi antaŭdis la tutan nokton.—Kia bela kanto! — La scienco rapide progresadas: ĉiutage ia nova progreso nin ĉarmas.—Estu benata la progresado!

1Ka  
L 4

## LECCION 41

*Tema 105.* Ĉu vi volas ion por mia frato?—Ĉu vi iras ĉe lin? — Diru al li, do, ke li ne penu iri Madridon, ĉar estas eble, ke tie ĉi mem kaj per la multevalora helpo de la fremdulo, kiu ve-

nis hieraŭ, ni povos konvinki unujn kaj aliajn. — Por kio taŭgas tiu plumo tiel maldika? — Ĝi taŭgas por desegni. — Kiom da broŝuroj restas al la pentristo? — Pleje restos al li dudek. — Kion vi deziras? — Mi dezirus aĉeti belan florvazon por mia fianĉino kaj ledan paperujon por mi. — Kiel vi pasigas la tempon? — Legante kaj skribante, sed de nun mi ne skribos plu (ĉ mi jam ne skribos). — Kiam alvenis la koncertisto? — Li alvenis la antaŭtago de la balo de markizino A. — Ĉu vi iros en la teatron tiun ĉi vesperon (ĉ hodiaŭ vespere). — Kredeble ne; la opero ne plaĉas al mi. — Kiom valoras tiu ĉi palaco? — Cent mil durojn ĉirkaŭe. — Tre bela sumo! — Kien vi iris vespere? — Vespere, ni iris ĝis la promenejo, sed ni ne eniris, ĉar estis tre malfrue. — Kiom da pecoj ni havas? — Ni havas dudek pecojn ĉirkaŭe. — Ĉu vi venas kun mi? — Ne, mi iras dekstren. — Adiaŭ, do, ĝis la sabato. — Ĝis la revido.

*Tema 106.* La venontan semajnon ni iros Parizon. — La venonta semajno havas du festtagojn. — Mi ne estas el tiuj (ĉ mi ne apartenas al tiuj), kiuj promesas, kaj poste ne plenumas sian vorton; konfidu al mi. — Mi restos tre danka al vi. — Ne diru tion. — Eĉ ne penindas paroli pri ĝi. — Trankviliĝu, mi taŭgaranĝos ĉion. — Mi certigas al vi, ke li ne iros plu. — Surverŝonte siajn florpotojn, la brunulino petis al mi la surverŝilon. — La ĉasisto pafis preskaŭ ne celdirektante kaj vundis ĝian voston. — Enverŝu puran akvon en la lavvazon, por ke mia nevino sin lavu. — La malamikoj dispecigis lian korpon. — Mi bedaŭras esti dirinta tion, sed mi ne ŝercos plu (ĉ mi jam ne ŝercos). — Laŭ leteroj ricevitaj el fremlandoj, ĉeestos multaj esperantistoj — Mi restos en Valencio ĝis la monato Oktobro, ĉar mi ne sentas min tre bone. — Petante pardonon, li trenis sin ĝis miaj piedoj. — Fajlis fajrero sur la vesttrenaĵon kaj bruligis ĝin. — Diru al li, ke li sendu la menditajn komercaĵojn kiel eble plej baldaŭ (ĉ plej baldaŭ kiel eble).

*Tema 107.* Ĉiuj misj penoj por ke li ne koleru, estis senu-tlaj; li estas homo netaŭga por tiaj ckaĵoj. — La servistino enverŝis la vlandan sukron en uzitan terpoton; tial ĝi estis malbon-gusta. — Ŝia pala vizaĝo lumigita per lumradio havis superna-

turan ŝajnon.— Mia respondo kolerigis la popolon kaj eĉ la infanoj insultis min.— Mi ne estas kompetenta pri tio, sed ĝi ŝajnas al mi sprita elpenso.— La balkonoj de mia ĉambro estas turnitaj al strato A., sed la fenestroj de la dormoĉambro de mia fratino, estas turnitaj al la ĝardeno.—Ĉu vi volas ludi je la ŝako (ó ŝakludi?)—Nun mi ne povas, mi tuj ludos je pilko kun via filo.—Ĉu vi volas cigaredon?—Dankon, mi ne fumas.—Kun kiu li venis?—Li venis kune kun mia frato.

## LECCIÓN 42

*Tema 108.* Kiam vi komencis skribi?—Kvankam vi tion ne kredas, mi komencis skribi, kiam li ĝin ordonis al mi.—Kio okazis al li?—Mi ne scias, kio okazis al li; jen li saltis, jen li ploris, jen li diris, ke li estas malsana.—Kie vi vidis lin?—Ni estis tuj enirontaj la templon, kiam ni lin vidis.—Ĉu ni rajde promenos, se la generalo venos?—Ĉu li venos, ĉu li ne venos, ni promenos rajde.—Mi kredis, ke vi estas pli bona rajdanto.—Kunvenis en tiel malgranda ĉambro multaj personoj kaj post malmulte la aero iĝis nespirebla.—Iliaj Princaj Moŝtoj ekmontriĝis en la balkono kaj varme salutis la popolon.—Ĉu tage, ĉu nokte, li venas vidi min ĉiutage.—Ni eksciis per nia kuzo Antonio, ke vi estas en Parizo.—Kiam ni nin renkontis, mi legis iajn presaĵojn, kiujn oni donis al mi antaŭ tri tagoj.—Ŝia patrino estis virta, sed ŝi ne estas tia.—Tiuĵ broŝuroj presigos la venontan monaton, kiam ni estos ricevintaj la novajn presilojn.—Pruntedonu al mi la pulvigilon.—Kia bela tapiŝo!

*Tema 109.* Li kredis, ke tio, kion oni sendis al li per la lakeo, estas bankaj biletoj.—Oni murmuris, ke Lia Generala Moŝto venos morgaŭ, sed mi tion (ó ĝin) ne certigas.—Jen li ridas, jen ploras.—Ludi kaj drinki okazigas pli vundojn, ol ĉiuj pafarmiloj.—Via Sinjora Moŝto ne povas kredi ĝin (ó tion).—Lia spiraĵo montris, ke li estis drinkinta.—La ĉevalblekoj anoncis la alvenon de la skadrono.—Sur la supraĵo de la maro, oni vidas ankoraŭ la mastaron de la ŝipo, kiu subakviĝis hieraŭ

matene.—Mi uzos tiun ĉi kupran tabulon por rebonigi la kase-rolon. — Hieraŭ ni parolis pri tio en nia rondo kaj ĉiuj opiniis, ke li pafis la pistolon antaŭ al alveni al la pordo. — Vintre (ó en vintro, ó dum vintro) ni trinkas vinon kaj somere (ó dum some-ro ó en somero) cidron.—Ĉu vi ŝatas la merizojn?— Jes, sed mi preferas la persikojn. — La nacio funebras pro la morto de la imperiestro.—Ni promenis ĝis la rando de la ĝardeno.—Anko-raŭ ni ne ricevis monon el la firmo A. — Kiam enŝipiĝos viaj gastoj?— Kredeble miaj gastoj enŝipiĝos morgaŭ.

## LECCION 43

*Tema 110.* Ĉu vi pruntedonos al mi vian razilon?— Tre volonte.—Mi raziĝos morgaŭ.—Mi min razos morgaŭ. — Kion vi atendas? ĉu eble vi atendas la alvenon de la tinkturisto?—Tio, kion mi atendas ne estas la alveno de la tinkturisto, sed la lete-roj de miaj farmuloj. — Ĉu vi scias glitiri? — Jes, sed nun mi ne havas glitilojn.— La negroj, kiuj dancis antaŭ Iliaj Reĝaj Moŝ-toj, nun vizitas la halon.—La virino, kiu venas estas mia duon-patrino. — Tio, kion mi bedaŭras, estas, ke la buĉisto ne venos tiel baldaŭ, kiel mi deziras. — En la momento kiam la oficistoj eliris, iu forprenis mian paperujon.—La bakistoj hejtis la bake-jon por baki la panon tiun nokton mem. — Ekbruligu lumon, ĉar tio estas tre malluma. — Estas tre malfacile nuligi la reĝan decidon. — La infano gratis sian kapon pensante, kion li res-pondos al mia demando. — La hebreo, mia najbaro, estas pli ŝparema ol via duonpatro. — Tuj kiam ili malŝtopis la botelojn okazis io neatendita kaj terura. — Kia bela forno! — Kie estas la sorba papero?— Antaŭ nelonge mi metis ĝin sur la tablon.— Kia amuzo!

*Tema 111.* Kolerinte pro mia respondo, li disŝiris la deseg-naĵon.—Ĉu oni blue tinkturos la vestaĵojn de la kondukisto? — Oĝi ilin tinkturos nigre. — La kuiristino multe salis la supon; almenaŭ li ĵetis plenmanon da salo.—Tiu ĉi sardino estas mal-bone peklitaj. — Ĉar la ĉevalo estis glitinta, ni alkuris helpi la

rajdanton.— Mi legos la unuan volumon tiun ĉi nokton. — Volonte mi forirus kun vi.— Ĉar li estis malbone tinkturinta mian pajlan ĉapelon, mi ne volis pagi ĝin.—Konvenas, ke vi ne malsparu tiom.—Honesta kaj konstanta amuzado, jen kio konvenas al la malsanulo.—Elpelite el la societo, mi ne kuraĝis akompani miajn gastojn.—Li amuziĝis trapikante la paperon per pinglo.—Las postsignoj de la hufoj de lia ĉevalo montris al ni la vojon de li trakuritan; tial senŝanceliĝe ni nin direktis tien.—Mia teruro estis tia, ke mi ne povis elparoli vorton.—Unuigitaj Amerikaj Ŝtatoj.

#### LECCION 44

*Tema 112.* Kiun arbon li desegnis?—Li desegnis la grandan arbon.—Kiel li desegnis la arbon? Ĉu granda aŭ malgranda? —Li desegnis la arbon granda.—Ĉiuj diras, ke mia patro bonfartas, sed mi trovas mian patron malsana.—Kiam mi venis el Madrido mi trovis mian filon malsana.—Mi serĉis ĉiujn miajn gefilojn, sed mi ne povis trovi mian malsanan filon.—Tial oni nomis provincestro mian onklon.—Hieraŭ mi rompis botelon kaj nun mi ĝin serĉas por ĝin doni al vi, sed mi ne trovas la botelon rompitan.—Ĉu vi trinkos glaseton da likvoro? —Tre volontе.—Ho, kia malfeliĉo!—Kio okazas?—Okazas, ke mi serĉis la likvoron kaj mi trovis la botelon rompita.—Li nomis sian serviston besto.—Li trovis vian poŝtkarton afabla kaj kiam li volis legi ĝin al mi, li ekserĉis ĝin en la tuta ĉambro, sed vane; fine li decidis skribi al vi dirante, ke li ne povas respondi viajn demandojn, ĉar li ne retrovas vian afablan poŝtkarton.—En tiu ĉi afero, li deziras montri sin senpartia.—Donu al mi la tablon malgrandan kaj mi faros ĝin granda, tiel granda kiel la alia.—Kvankam la steloj rapidege kuras, ni vidas ilin senmovaj.—Mi ja scias, ke la botelo estas blua, sed mi vidas ĝin ruĝa.

*Tema 113.* Oni enterigis la pendigiton en tiu loko mem.—Kiam la serpento lin mordis, lia frato suĉis la vundon por eltiri la venenon.—Tiam la infano ne volis mamsuĉi kaj poste li pasigis la nokton plorante.—Estos pli bone, se vi mem senŝeligos la

fruktojn.—Forĵetu ideojn tiel funebrajn. — Mi dezirus malŝtopi tiun ĉi botelon, sed mi ne havas korktirilon.— La uragano ĵetis la ŝipon kontraŭ la ŝtonegojn kaj la ektuŝo dispecigis ĝin. — Estis tre malvarmega vintro kaj la fruktoj tute frostiĝis. — La libro estas vere interesa. — Ĉar vi ne parolas pri interesantaj aferoj, mi foriras. — De la plej alta fenestro de la turo oni vidas la personojn tre malgrandaj.— La pastro benis nin pro la bono, kiun ni estis farintaj. — Mia duonfrato estas kolektisto de poŝtmarkoj.—Ankoraŭ mi estas aĉetonta sigelvakson por mia onklo kaj manviŝilojn por mia kuzino.—Kiom vi vetas?—Mi vetas tri pesetojn por vi.—Kiel vi trovas la teon?—Mi trovas ĝin dolĉa.—Se mi estus lerninta ĉiujn lecionojn de tiu ĉi «*Praktika kurso*», mi estus ellerninta la lingvon internacian. — Interkonsentite ke Esperanto estu la lingvo internacia, ni povas diri ke ĝi estas la helpa lingvo. — Ĉar du malsamlingvuloj povas akcepti la lingvon francan por sin interkompreni, ni povas diri, tiaokaze, ke la franca lingvo estas helpanta lingvo.



## CLAVE DE LOS EJERCICIOS

---

### LECCION 22

- I. *Administri*: mi administras; vi administras; li, ŝi administras; ni administras, ili administras. — *Agiti*: mi agitas; vi agitas, etc. — *Konsterni*, mi konsternas; vi konsternas, etc. — *Mezuri*: mi mezuras, etc. — *Minaci*: mi minacas, etc. — *Prepari*: mi preparas, etc. — *Puŝi*: mi puŝas, etc. — *Razi*: mi razas, etc.
- II. *Progresi*: mi progresus; vi progresus; li, ŝi progresus; ni progresus, ili progresus. — *Manovri*: mi manovrus; vi manovrus, etc. — *Komentarii*: mi komentarius, etc. — *Kastri*: mi kastrus, etc. — *Kompari*: mi komparus, etc. — *Prezidi*: mi prezidus, etc. — *Konsideri*: mi konsiderus, etc. — *Akompani*: mi akompanus, etc.
- III. *Malaprobi* = desaprobar; *maljuna* = viejo (adj.); *malbeni* = maldecir; *malgajni* = perder; *malĉoieta* = agitado, inquieto; *malavara* = generoso; *maljusta* = injusto.

### LECCIÓN 23

- I. *Aresti*: mi arestos, mi estos arestinta; vi arestos, vi estos arestinta; li, ŝi arestos, li, ŝi estos arestinta; ni arestos, ni estos arestintaj; ili arestos, ili estos arestintaj. — *Aplaŭdi*: mi aplaŭdos, mi estos aplaŭdinta, etc. — *Maĉi*: mi maĉos, mi estos maĉinta, etc. — *Naĝi*: mi naĝos, mi estos naĝinta, etc. — *Plugi*: mi plugos, mi estos pluginta. — *Procesi*: mi procesos, mi estos procesinta, etc. — *Inspiri*: mi inspiros, mi estos inspirinta, etc. — *Persekuti*: mi persekutos, mi estos perseku-



tinta, etc.—*Prezenti*: mi prezentos, mi estos prezentinta, etc.  
 — *Riproĉi*: mi riproĉos, mi estos riproĉinta, etc.—*Rekomen-  
 di*, mi rekomendos, mi estos rekomendinta, etc.

- II. *Remi*: mi remu; (vi) remu; li, ŝi remu; ni remu; ili remu.  
 — *Respekti*: mi respèktu; (vi) respektu, etc. — *Salti*: mi sal-  
 tu; (vi) saltu, etc. — *Saturi*: mi saturu; (vi) saturu, etc. —  
*Skui*: mi skuu; (vi) skuu, etc.— *Supozi*: mi supozu; (vi) su-  
 pozu, etc.—*Surprizi*: mi surprizu; (vi) surprizu, etc.—*Ŝviti*:  
 mi ŝvitu; (vi) ŝvitu, etc. — *Obei*: mi obeu; (vi) obeu, etc. —  
*Influi*: mi influu; (vi) influu, etc. — *Akiri*: mi akiru; (vi)  
 akiru, etc. — *Murmuri*: mi murmuru; (vi) murmuru, etc.—  
*Konstrui*: mi konstruu; (vi) konstruu, etc.

- III. *Arbaro* = bosque, arboleda; *ŝtuparo* = escalera; *homaro*  
 = humanidad; *abiaro* = bosque de abetos; *azenaro* = recua  
 de asnos; *ĉevalaro* = colección de caballos; *aŭdantaro* =  
 auditorio; *cedraro* = bosque de cedros; *demonaro* = legión  
 de demonios; *gazetaro* = prensa, conjunto de periódicos;  
*juvelaro* = aderezo; *klavaro* = teclado; *cipresaro* = bosque  
 de cipreses.

## LECCION 25

- I. *Rekompenci*: mi rekompencis, mi estis rekompencinta; vi  
 rekompencis, vi estis rekompencinta; li, ŝi rekompencis, li,  
 ŝi estis rekompencinta; ni rekompencis, ni estis rekompenc-  
 intaj; ili rekompencis, ili estis rekompencintaj.—*Posedi*: mi  
 posedis, mi estis posedinta, etc. — *Krei*: mi kreis, mi estis  
 kreinta, etc. — *Respondi*: mi respondis, mi estis respondin-  
 ta, etc.—*Ronki*: mi ronkis, mi estis ronkinta, etc.—*Kompre-  
 ni*: mi komprenis, mi estis kompreninta, etc. — *Inviti*: mi  
 invitis, mi estis invitinta, etc. — *Pagi*: mi pagis, mi estis pa-  
 ginta, etc.—*Viziti*: mi vizitis, mi estis vizitinta, etc. — *Kon-  
 servi*: mi konservis, mi estis konservinta, etc. — *Konsoli*: mi  
 konsolis; mi estis konsolinta, etc. — *Prediki*: mi predikis, mi  
 estis predikinta, etc.

- II. *Gladistino* = planchadora; *arĥitekturisto* = arquitecto;

*balenisto* = ballenero; *aventurista* = aventurero; *dentisto* = dentista; *brodistino* = bordador; *casista* = cazador; *fablito* = fabulista; *gantista* = guantero; *deseñista* = dibujante; *gitarista* = guitarrista; *gacetista* = periodista; *komercisto* = comerciante; *flutista* = flautista; *hemiisto* = químico; *kudristino* = costurera; *karbisto* = carbonero; *helpisto* = ayudante.

## LECCIÓN 26

- I. *Konsumi*: mi konsumas, vi konsumas, etc.; mi konsumis, vi konsumis, etc.; mi konsumos, vi konsumos, etc.; mi konsumus, vi konsumus, etc.; mi konsumu, (vi) konsumu, etc. — *Eviti*: mi evitas, mi evitis, mi evitos, mi evitus, mi evitu, etc. — *Interesi*: mi interesas, mi interesis, mi interesos, mi interesus, mi interesu, etc. — *Konsili*: mi konsilas, mi konsilis, mi konsilos, mi konsilus, mi konsilu, etc. — *Konspiri*: mi konspiras, mi konspiris, mi konspiros, mi konspirus, mi konspiru, etc. — *Kribri*: mi kribras, mi kribris, mi kribros, mi kribrus, mi kribru, etc. — *Perdi*: mi perdas, mi perdis, mi perdos, mi perdus, mi perdu, etc. — *Permesi*: mi permesas, mi permesis, mi permesos, mi permesus, mi permesu, etc. — *Reservi*: mi rezervas, mi rezervis, mi rezervos, mi rezervus, mi rezervu, etc. — *Tenti*: mi tentas, mi tentis, mi tentos, mi tertus, mi tentu, etc. — *Turmenti*: mi turmentas, mi turmentis, mi turmentos, mi turmentus, mi turmentu, etc. — *Konfesi*: mi konfesas, mi konfesis, mi konfesos, mi konfesus, mi konfesu, etc.
- II. *Apogilo* = apoyo; *distililo* = destilador; *bolilo* = marmita, aparato para hervir algo; *drašilo* = trillo; *fajlilo* = lima; *filtrilo* = filtro; *fosilo* = azada; *kombilo* = peine; *segilo* = sierra; *flugilo* = ala; *faldilo* = guadaña, hoz; *kribrilo* = criba; *kudrilo* = aguja de coser; *gladilo* = plancha; *erpilo* = rastrillo; *frakasilo* = almirez, aparato para machacar algo; *fajfilo* = pito; *balailo* = escoba.

## LECCION 27

I. *Arkigi* = arquear; *arkigi* = arquearse; *bravigi* = embravecer; *bravigi* = embravecerse; *elastigi* = hacer elástico; *elastigi* = hacerse elástico; *elokventigi* = hacer elocuente; *elokventigi* = hacerse elocuente; *sandigi* = fundir; *sandigi* = fundirse; *flamigi* = inflamar; *flamigi* = inflamarse; *kurbigi* = encurvar; *kurbigi* = encurvarse; *indiferentigi* = hacer indiferente; *indiferentigi* = hacerse indiferente; *intimigi* = hacer íntimo; *intimigi* = intimar, hacerse íntimo; *blankigi* = blanquear (hacer blanco algo); *blankigi* = blanquearse (volverse blanco algo); *kripligi* = estropear, mutilar; *kripligi* = estropearse, mutilarse; *publikigi* = publicar, hacer público; *publikigi* = publicarse, hacerse público.

### Ejemplos

La avareco elastigas la monon. — La mono elastigas en liaj manoj.

La okazo elokventigis lin. — Li elokventigis pritraktante nian aferon.

La malfeliĉo indiferentigis sin. — Ili indiferentigis antaŭ mia peto.

La kunestado intimigis ilin. — Ili intimigis dum la juneco.

Mi blankigas la muron. — Miaj haroj blankigas.

Mia amiko publikigis tion. — La sciigo publikigis hieraŭ.

II. *Distingebla* = distinguible; *ekstermebla* = exterminable; *penetrebla* = penetrable; *rafinebla* = refinable; *inokulebla* = inoculable; *decifrebla* = descifrable; *aŭdebla* = oible; *lernebila* = aprendible.

## LECCION 28

I. *Decidi*: mi estis decidinta; vi estis decidinta; li, ŝi estis decidinta; ni estis decidintaj, vi estis decidintaj; ili estis decidintaj; mi estos decidinta, vi estos decidinta, etc.; mi estus deci-

dinta, etc.; mi estu decidinta, etc. — *Dividi*: mi estis dividinta; mi estos dividinta, mi estus dividinta, mi estu dividinta, etc. — *Eduki*: mi estis edukinta, mi estos edukinta, mi estus edukinta, mi estu edukinta, etc. — *Forĝi*. — *Froti*. — *Ĝemi*. — *Imiti*: mi estis forĝinta, mi estos frotinta, mi estus ĝeminta, mi estu imitinta, etc. — *Kreski*. — *Okupi*: mi estis kreskinta, mi estos kreskinta, mi estus okupinta, mi estu okupinta, etc. — *Promesi*. — *Ripeti*. — *Veneni*. — *Frap*: mi estis promesinta, mi estos ripetinta, mi estus veneninta, mi estu frapinta, etc.

- II. *Abrikotujo* = albaricoquero; *ĉerizujo* = cerezo; *avelujo* = avellano; *citronujo* = limonero; *karobujo* = algarrobo; *kokosujo* = cocotero; *kaŝtanujo* = castaño; *bombonujo* = bombonera; *frambujo* = frambueso; *cigaredujo* = cigarreta, pitillera; *kartoĉujo* = cartuchera; *paperujo* = cartera.

## LECCION 29

- I. *Formanto* = el que forma; *formanta* = que forma; *formante* = formandó.

*Forminto* = el que formó; *forminta* = que formó; *forminte* = habiendo formado.

*Formonto* = el que formará; *formonta* = que formará; *formonte* = habiendo de formar.

*Reformanto* = el que reforma; *fermentanta* = que fermenta; *fumante* = fumando.

*Garantiintino* = la que garantizó; *kontraktinta* = que contrató; *korektinte* = habiendo corregido.

*Kritikonto* = el que criticará; *likvidonta* = que liquidará; *limigonte* = habiendo de limitar.

*Obstrukcinto* = el que obstruccionó; *praktikonta* = que practicará; *praktikante* = practicando.

Reformonté la ĉapelon, la praktikantino aĉetis verdajn rubandojn.

Fuminte cigaredon, la korektanta onklo komencis sian laboron.

La kontraktinta viro estis limigonta la ĝardenon.

- II. *Abatejo* = abadía; *banejo* = establecimiento de baños; *barbirejo* = barbería; *ermitejo* = ermita; *edukejo* = centro educativo; *episkopejo* = obispado; *drogejo* = droguería; *herbejo* = prado; *ternejo* = escuela; *lavejo* = lavador; *kaŝejo* = refugio, escondite; *kafejo* = café (establecimiento); *ĉevalejo* = cuadra.

## LECCION 30

- I. *Renversi*: m estas renversata, vi estas renversata, li estas renversata; ni estas renversataj, vi estas renversataj, ili estas renversataj; mi estas renversita, vi estas renversita, li estas renversita, ni estas renversitaj, vi estas renversitaj, ili estas renversitaj. — *Savi*: mi estas savata, etc.; mi estas savita, etc. *Devigi*: mi estas devigata, etc.; mi estas devigita, etc. — *Venki*: mi estas venkata, etc.; mi estas devigita, etc. — *Degradi*. — *Ekzameni*: mi estas degradata, etc.; mi estas ekzamenita, etc. — *Eduki*. — *Veneni*: mi estas edukata, etc.; mi estas venenita, etc. — *Makuli*. — *Minaci*: mi estas makulata, etc.; mi estas minacita, etc. — *Montri*: mi estas montrata, etc.; mi estas montrita, etc. — *Nomi* — *Puni*: mi estas nomata, etc.; mi estas punita.
- II. *Angeleto* = angelito, *anguleto* = rinconcito; *ĉapeto* = gorrito; *ĉerketo* = ataudito; *rideti* = sonreir; *dormeti* = dormir; *flugeti* = voletear; *varmeta* = tibio; *floreto* = florecilla; *angileto* = anguilita; *koloneto* = columnita; *nesteto* = nidito; *pilketo* = pelotita; *trueto* = agujerito; *vojeta* = sendero; *biskviteto* = bizcochito.

## LECCION 31

- I. Mi estos atakata; vi estos kalumniita; li, ŝi, ĝi estus proklamata; ni estus favoritaj; vi estos komisiataj; ili estos aluditaj; mi estus konvertata; vi estus denunciata; li, ŝi, ĝi estos ekstermata, ni estos ekzilitaj...

- II. *Antikvulo* = antiguo (sust.); *arogantulo* = arrogante (sust.); *eminentulo* = eminente (sust.); *intringulo* = intrigante (sust.); *krimulo* = criminal; *leprulo* = leproso; *mizerulo* = miserable, indigente; *rentulo* = rentista; *scienculo* = sabio; *spertulo* = experto (sust.); *sovaĝulo* = salvaje (sust.).

### LECCION 32

- I. *Cedema* = condescendiente; *ĉikanema* = enredador, embrollador; *entreprenema* = emprendedor; *esplorema* = investigador, explorador; *flatema* = adulador; *konkurema* = competidor; *meditema* = meditabundo; *oferema* = dado al sacrificio; *plorema* = llorón; *dormena* = dormilón.
- II. Mi estu admonata; vi estu avertata; li, ŝi, ĝi estu dorlotata; ni estu dotataj, vi estu ekscitataj; ili estu ekzekutataj.  
Mi estu gvidita; vi estu observita; li, ŝi, ĝi estu parfumita; ni estu ŝmiritaj; vi estu ŝmiritaj; ili estu ŝmiritaj.

### LECCION 33

- I. Uzurpato — Ventolata — Taksate.  
Sorboto — Selita — Raspite.  
Premioto — Mordetota — Kulpigote.  
Kovato — Kovita — Kovote. — etc.
- II. *Bandestro* = jefe de un bando, de una cuadrilla; *Eskadrestro* = jefe de escuadra; *Eskadronestro* = capitán de escuadrón; *Korpusestro* = general de un cuerpo de ejército; *Bateriestro* = capitán de una batería; *Rotestro* = capitán de compañía; *Guardiestro* = jefe de una guardia; *Brigadestro* = general de brigada; *Diviziestro* = general de división.

### LECCION 34

- I. *Arbitraĵo* = una arbitrariedad; *ĉarlatanajo* = una charlatanería; *distraĵo* = una distracción; *ĵanfaronajo* = una fanfarronería; *abomenaĵo* = cosa abominable; *difinaĵo* =

definición, una determinación; *diskontaĵo* = un descuento; *falsaĵo* = una falsificación; *figuraĵo* = cosa figurada; *kokeĵo* = una coquetería; *komunikaĵo* = una comunicación; *konfitaĵo* = confitura, cosa confitada; *kontuzaĵo* = una contusión; *lutaĵo* = soldadura; *marcipanaĵo* = cosa de mazapán; *mendaĵo* = encargo, pedido; *monstraĵo* = monstruosidad; *pakoĵo* = paquete; *produktaĵo* = producto; *rabotaĵo* =

*virtuta* ~~serpio~~

## LECCION 35

*Alaŭdido* = hijo pequeño de la alondra; *anasido* = hijo pequeño del ánade; *bubalido* = hijo pequeño del búfalo; *cervido* = cervato; *delĵenido* = hijo pequeño del delfín; *elefantido* = hijo pequeño del elefante; *falkido* = hijo pequeño del halcón; *fazanido* = hijo pequeño del faisán; *gazelido* = hijo pequeño de la gacela; *ĝirafido* = hijo pequeño de la jirafa; *kamelido* = hijo pequeño del camello; *leporido* = hijo pequeño de la liebre; *perdríkido* = perdigón; *rinocerido* = hijo pequeño del rinoceronte; *ŝakalido* = hijo pequeño del chacal; *ŝarkido* = hijo pequeño del tiburón; *simio* = hijo pequeño del mono; *turtido* = hijo pequeño de la tórtola; *ursido* = oseño; *viperido* = viboreño; *vulpido* = hijo pequeño del zorro.

FINO